Před zkušební komisí Ústředního Svazu Bohema Unio Esperantista konají se dne 26. prosince roku 1912 **ZKOUŠKY Z ESPERANTA.** Praha II., Vodičkova ulice č. 38.



BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

Kun literatura aldono

LEGOLIBRO DE BOHEMAJ ESPERANTISTOJ

Oficiala organo de bohemaj Esperantistoj ĉiuj de
CENTRA ASOCIO
BOHEMA UNIO ESPERANTISTA (B. U. E.)

Ni laboros por Esperanto.

CENTRA ASOCIO BOHEMA UNIO ESPERANTISTA.
— SÍDLO: PRAHA I. 342. KAVÁRNA „UNION". —
KANCELÁŘ A UČEBNA: II. VODIČKOVA ULICE 38.
REDAKCE REVUE: II. DITTRICHOVA ULICE 7.

Členové klubů sdružených v „Ústředním Svazu Bohema Unio Esperantista" a těch, které za jeho součinnosti se ustavují, dostávají tuto revui za roční předplatné K 2·50 prostředniotvím pp. jednatelů.

Svaz jednotlivců „Ligo de Bohemaj Esperantistoj". Klub Esp. v Praze (dříve „U Donátů") a Klub Esp. v Radvanicích dávají členům tuto revui zdarma.

1912. LISTOPAD-PROSINEC — NOVEMBRO-DECEMBRO VI. 9. 10.

Roční předplatné: 3 K.

Cena tohoto dvojčísla s přílohami: 60 hal.

ČASOPIS ČESKÝCH ESPERANTISTŮ
BOHEMA REVUO ESPERANTISTA

vychází 10krát ročně (kromě srpna a září). | eliras monate (krom aŭgusto kaj septembro).

Redaktor: **Ed. Kühnl.**

Předplatné (ročně **3 K** pro Rakousko, Fr. 3·75 pro cizinu), a vše týkající se časopisu, budiž zasláno pouze na adresu: „Časopis Českých Esperantistů", Praha II.-2023, Dittrichova ul. 7. Redakce vyhražuje si právo upraviti články pro tisk. Netištěné rukopisy se vrátí, byla-li přiložena známka; pracem původním dána přednost. Abonpago, akceptata por almenaŭ unu jaro (**Fr. 3·75** = 1·50 Sm por fremdlando, 3 K por Aŭstrio), kaj ĉio, kio koncernas la gazeton, estu sendata laŭ adreso:

„Časopis Českých Esperantistů" en Praha II. (**Bohemujo - Aŭstrio**).
II.—2023. Dittrichova ul. 7.
Konto ĉe la **Ĉekbanko Esperantista en London**.
Účet pošt spořitelny 93.281.

* *

OBSAH - ENHAVO:

DEKJARA JUBILEO DE ESPERANTO EN BOHEMUJO.

La Esperantista Klubo en Praha, kiu estis fondita la 9. XII. 1902, festas la jubileon de sia dekjara ekzistado, kiu signifas gravan epokon en nia afero, ĉar per fondiĝo de tiu ĉi unua klubo bohema nia movado trovis firman teron kaj daŭran apogon inter Bohemoj. La samideanoj en Praha intencas soleni tiun ĉi signifoplenan datrevenon per festa vespero okazonta la 14. XII. 1912 en la restoracio „U Vejvodů" (Praha I. Vejvodova ul.).

DESETILETÉ JUBILEUM ESPERANTA V ČECHÁCH.

Klub Esperantistů v Praze, který byl založen dne 9. prosince 1902, oslaví jubileum svého desetiletého trvání, které jest významným bodem v našem hnutí, neboť založením tohoto prvního klubu českého našlo Esperanto pevnou půdu a trvalou podporu mezi Čechy. Přátelé pražští oslaví toto významné výročí slavnostním večírkem, který se bude konati v restauraci „U Vejvodů" dne 14. prosince 1912 (Praha I., Vejvodova ul. nedaleko Perštýna).

Deset let činnosti . . .

Doba vyplněná opravdovou, nezištnou prací členstva, věnovanou vznešené myšlence. Jako všechen pokrok uskutečňuje se bez vědomí širší veřejnosti, překonávaje překážky ať nedůvěrou nebo lhostejností do cesty mu stavěné, tak i těchto prvních deset let v otázce rozvoje pomocného jazyka u nás znamená etapu obzvlášť významnou. Jednotlivci, vedeni stejným cílem, spojili se ke společné práci, která založením prvního klubu esperantského v Čechách dochází dnes již zaslouženého ocenění, neboť z tohoto prvního střediska vznikají nové podniky a ohniska propagačního ruchu v oblastech českých.

S potěšením přineseme přehled plodné činnosti pražského klubu, který dal r. 1907 podnět k založení českého ústředí esperantského.

DANKESPRIMO.

London, 29. de Oktobro 1912.

Estimata samideano.

Mi kore vin dankas pro la sendita al mi ekzemplero de via „Esperanta kurso" (lernolibro). Mi ĉiam ĝojas, vidante novan praktikan rimedon por disvastigi tiun altidealan kaj belsonan lingvon Esperanto, kiu jam faris kaj nepre ankoraŭ faros tiom por interamikigi la popolojn de la mondo.

Samtempe mi deziras esprimi al la Bohema Unio Esperantista mian sinceran dankon pro la atesto de honora membreco, kiun ĝi bonvolis doni al mi per s-o H. Bolingbroke Mudie, prezidanto de la Brita Esperantista Asocio, okaze de la adiaŭa festeno aranĝita de la Civito de Londono je honoro de la urbestraroj de Wien, Praha kaj Ischl. Des pli mi ĝojas, ke tiu transdono okazis ĉe tia momento kaj dum tia interurba amikofesto, kiu estis ja sensimila praktika elmontro de tiu benanta homarama spirito, kiu inspiras la Esperantistojn en ilia mondutila laboro, kun kiu mi profunde simpatias.

Sincere via

Th. V. Strong.

REČ DR. L. L. ZAMENHOFA

při zahájení VIII. mezinárodního kongresu Esperantistů.

Vizte příčinu, která mne donutila učiniti toto rozhodnutí: Jsoucnost jakéhosi přirozeného, stálého vůdce, byť i tento vůdce měl pouze ráz sjednocující vlajky, jest závažnou nevýhodou pro naši věc, poněvadž jí dává jaksi osobní ráz. Nelíbí-li se někomu moje osoba nebo moje politicko-náboženské zásady, stává se nepřítelem Esperanta. Vše, co osobně mluvím nebo konám, uvádí se v souvislost s Esperantem. Příliš čestný titul „mistra", který mi přidělujete, ačkoliv ve skutečnosti týče se jen záležitosti jazyka, oddaluje od Esperanta mnohé osoby, kterým já pro jakoukoliv příčinu nejsem sympatickým a které se bojí, že, stávajíce se Esperantisty, musely by mne považovati za svého morálního vůdce. Každý, jehož mínění o věcech esperantských jest jiné než mé, zdráhá se často vysloviti volně svůj názor, aby veřejně nestavěl se proti tomu, koho Esperantisté nazývají svým mistrem. Nechtějí-li Esperantisté něčí názor přijmouti, vidí v tom jenom všemocný vliv mistra. Nyní, když naše věc jest již dosti silná, jest nutno, aby se konečně stala úplně volnou, nejen volnou ode všech osobních n a ř í z e n í, jakou se stala již před 25 roky, ale také od všelikého skutečného nebo zdánlivého osobního v l i v u. Jest nutno, aby svět zcela jasně si uvědomil, že Esperanto může anebo i nemusí míti své dobrovolně zvolené vůdce, ale že vůbec nemá nějakého stálého m i s t r a. Jmenujte mne zakladatelem jazyka, anebo jakkoliv chcete, ale prosím vás, nejmenujte mne již „mistrem" poněvadž tímto morálně příliš závazným jménem spoutáváte naši věc. Mnozí z vás nosí ve svém srdci tytéž ideály jako já, ačkoliv ne všichni v úplně stejné formě; svět však musí věděti, že toto duševní příbuzenství mezi mnou a vámi jest dobrovolné, že esperantismus nemůže býti zodpovědným za mé osobní idee a tužby, které pro nikoho z vás nejsou závaznými. Mluvím, nebo konám-li něco, co se nesrovnává se vkusem nebo s přesvědčeními toho nebo onoho z vás, přeji si, aby to z vás nikomu nevadilo, a každý z vás aby měl právo říci: to jest úplně soukromá myšlenka nebo pošetilost Zamenhofova a nemá nic společného s esperantským hnutím, ve kterém on jest nyní osobou úplně soukromou. Vnitřní myšlenkou Esperanta jest: na neutrálním jazykovém základě odstraniti zdi mezi kmeny a navykati lidi, aby v každém svém bližním viděli jen člověka a bratra. Všecko, co jest nad tuto vnitřní ideu Esperanta jest pouze v ě c í s o u k r o m o u, která třeba může býti z a l o ž e n a na této idei, ale nikdy nesmí býti považována s ní za t o t o ž n o u.

*

Dříve, než složím se sebe každou officielní úlohu v naší věci, ještě naposledy vás napomínám: pracujte vždy v úplné jednotě, v pořádku a souhlasu. Všechny pochybné otázky, které vztahují se na celou věc esperantskou a které netýkají se osobní volnosti každého jednotlivého Esperantisty, řešte vždy v míru, pravidelnou dohodou svých rovnoprávně volených delegátů a ukázněným ustoupením menšiny většině. Nikdy nedovolte, aby v naší věci panovala zásada: „Kdo hlasitěji křičí, ten má pravdu". Jednotou dříve nebo později jistě zvítězíme, byť i celý svět proti nám bojoval, vnitřním nesvárem rozbořili bychom naši věc dříve, než by to mohli učiniti všichni naši nepřátelé společně. Nezapomeňte, že Esperanto není pouze jednoduchý jazyk, kterého každý z nás užívá

PAROLADO DE DR. L. L. ZAMENHOF

ĉe la malfermo de la Oka Internacia Kongreso Esperantista.

Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon: La ekzistado de ia natura konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono, aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉio, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donas al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernas nur la aferon de la lingvo, fortenas de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estas simpatia kaj kiuj timas, ke, fariĝante esperantistoj, ili devus rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu, kies opinio pri aferoj esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas, eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinion la esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur la ĉiopovan influon de la majstro. Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj dekretoj, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona influo. Estas necese, ke la mondo sciiĝu tute klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan majstron. Nomu min per mia nomo, nomu min fondinto de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu „Majstro", ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.

Multaj el vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spirita parenceco inter mi kaj vi estas laŭvola, ke la esperantismo ne povas esti responda pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio neniun el vi ĝenu kaj ĉiu el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata. La interna ideo de Esperanto estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur privataĵo, kiu povas eble esti bazita sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel identa kun ĝi.

*

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiuj koncernas la tutan Esperantan aferon, kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: „kiu pli laŭte krias, tiu estas prava". Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune.

jen pro své vlastní potřeby, ale že jest důležitým sociálním problémem, že k dosažení našeho cíle musíme stále propagovati svou věc a pečovati o to, aby svět měl k ní úctu a důvěru. Objeví-li se v naší věci něco, co zdá se nám špatným, můžeme to klidně odstraniti rozhodnutím společně dosaženým, ale nikdy nezasívejme v našem táboře vzájemnou zášť a nesvár, který pouze těší a vede k vítězství naše nepřátele. V prvních letech naší práce na naší vlajce byla napsána slova „naděje, houževnatost a trpělivost“; to zcela stačilo, neboť že my, stoupenci této idee, musíme se vzájemně ctíti a vzájemně si pomáhati, to bylo každému pochopitelno samo sebou. V posledních letech jsme bohužel často zapomněli této povinnosti; proto nyní, přecházejíce do druhého důležitého období naší historie, do druhého čtvrtstoletí, napišme na svou vlajku nové slovo a toho slova vždy si važme jako svatého přikázání; slovo to jest „shoda“.

*

Skončil jsem to, co chtěl jsem vám, drazí přátelé, říci. Vím velmi dobře, že mnohé z vás moje nynější řeč nepříjemně zbaví illusí. S trpkým pocitem nesplněné naděje budete se snad tázati: což neměl ve své poslední kongresní řeči, ve své „labutí písni“ nic více, co by nám řekl? zdaž v tento důležitý den jubilea esperantismu, toho jubilea, jež jsme dosáhli po tolika práci a strádání, nic více neměl, co by nám řekl? zdaž při této první a snad poslední příležitosti, kdy jsme se ze všech dílů světa přiblížili dle možnosti k tomu místu, kde Esperanto se zrodilo a kde ovzduší, nasycené plemenným nesvárem z nevyhnutelného přirozeného protitlaku, zrodilo hnutí esperantské — zdaž nic více neměl v této důležité a slavné chvíli, co by nám řekl? Ó, nikoliv, moji drazí přátelé, moji drazí stoupenci a spolupracovníci! Mnoho, mnoho, velmi mnoho chtěl bych vám dnes říci, neboť mé srdce jest plno; v jubilejní chvíli esperantismu chtěl bych mluviti k vám o tom, co zrodilo esperantismus, o jeho podstatě a následcích, v něž lze doufati; dnes však stojím před vámi ještě v úloze officielní a nepřeji si, aby mé soukromé kredo bylo považováno za povinné kredo všech Esperantistů. Proto mi odpusťte, že více nemluvím.

Co jest podstatou esperantské idee a k jaké budoucnosti přivede jednou lidstvo dorozumívání se na neutrálně lidském, mimo lidská plemena stojícím jazykovém základě, — to všichni cítíme velmi dobře, ačkoliv ne všichni v úplně stejné formě a stejném stupni. Dejme tedy dnes plně vládnouti tomuto tichému, avšak slavnostnímu a hlubokému citu, neprofanujme jej theoretickými výklady.

*

Přátelé! Starobylé polské hlavní město, ve kterém jsme se sešli, připravilo nám pohostinské přijetí, mnoho vykonalo, aby uctilo naši věc a aby zpříjemnilo nám náš pobyt během kongresu. Doufám, že při návratu domů každý z vás ponese ssebou nejlepší vzpomínku na tuto zemi a město, které většina z vás dosud asi velmi málo znala. Říši a zemi, které projevily nám své přátelství, hlavně však představenstvu hostinného města Krakova a všem ústavům a osobám, které daly našemu kongresu svou morální a hmotnou podporu, vyslovuji vaším jménem nejsrdečnější dík. Nejsrdečnější přátelský dík vyslovujeme ovšem především neúnavnému místnímu přípravnému výboru, který nešetřil práce na nejlepší uspořádání našeho kongresu. A nyní přeji vám všem veselou slavnost a úspěšnou práci.

Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribitaj la vortoj „espero, obstino kaj pacienco"; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: „konkordo".

* * *

Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone, ke multajn el vi mia nuna parolo malagrable seniluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: ĉu en sia lasta kongresa parolo, en sia „kanto de cigno", li nenion plí havis por diri al ni? ĉu en la grava tago de la jubileo de la esperantismo, de tiu jubileo, kiun ni atingis post tiom multe da laboroj kaj suferoj, li nenion pli havas por diri al ni? ĉu en la unua kaj eble ankaŭ la lasta fojo, en kiu ni el ĉiuj partoj de la mondo alproksimiĝis, kiom ni povis, al tiu loko, kie Esperanto naskiĝis kaj kie la atmosfero, saturita de intergenta malpaco per neevitebla natura reago naskis la esperantisman movadon, — ĉu en ĉi tiu grava kaj solena momento li nenion pli havis por diri al ni? Ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena; en la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskis la esperantismon, pri ĝia esenco kaj esperebIaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala kaj mi ne deziras, ke mia privata kredo estu rigardata kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tial pardonu min, ke mi pli ne parolas.

Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estonteco alkondukos iam la homaron la interkompreniĝado sur neŭtralehoma, sengenta lingva fundamento, — tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta, sed solena kaj profunda sento, ni ne profanu ĝin per teoriaj klarigoj.

*

Samideanoj! La antikva pola ĉefurbo, en kiu ni kunvenis, pretigis por ni gastaman akcepton, faris multe, por honori nian aferon kaj por agrabligi al ni nian restadon dum la kongreso. Mi esperas, ke, revenante en sian hejmon, ĉiu el vi kunportos kun si plej bonan rememoron pri tiu lando kaj urbo, kiujn la plimulto el vi ĝis nun verŝajne tre malmulte konis. Al la regno kaj lando, kiuj montris al ni sian amikecon, sed precipe al la estraro de la gastama Krakovo kaj al ĉiuj institucioj kaj personoj, kiuj donis al nia kongreso sian moralan kaj materialan subtenon, mi esprimas en via nomo la plej koran dankon. Plej koran kamaradan dankon ni esprimas komprenebIe antaŭ ĉio al la senlaca loka organiza komitato, kiu ne ŝparis laboron por la plej bona aranĝo de nia kongreso. Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajan feston kaj sukcesan laboron.

AHASVERO.

Novelo de Werner Granville-Schmidt, trad. de Kamilla Fürth.

(Fino.)

„Nelacigeble li laboris per fera diligenteco super siaj verkoj kaj per severega rigoreco super si mem, ĉar li volis fariĝi majstro, kiu submetus mondon. Lia nomo baldaŭ havis bonan reputacion malproksime trans la limoj de Verono, kaj kvankam li ĝuis gloron kaj honorigojn, li tamen restis modesta en sia koro, ĉar li amis la arton pro ĝi mem.

Sed unu tagon aperis la amo en la vivo de tiu ĉi viro. Dum la degelo li savis florantan, junan knabinon el la ondoj de Adiĝo; kiam li tenis la gracian knabinan korpon en siaj brakoj, subite li eksentis, kiel soleca estis lia vivo, sen alridoj de amata virino. Kaj la viro forgesis, ke li staris jam sur la sojlo de maljuneco; li alkatenis la florantan homan burĝonon al si; li opiniis, ke ŝi fariĝos lia feliĉo — kaj ŝi fariĝis kaŭzo de lia ruiniĝo." La maljunulo ektremis iomete; sed poste kuntiriĝis liaj brovoj kaj lia voĉo fariĝis krudsona

„Mi diru mallonge; ŝi fariĝis lia edzino kaj la viro amis ŝin per ĉiu fibro de sia koro. Lia dormetanta amo estis vekiĝinta, fortega, konsumanta, kvazaŭ brulo detruanta ĉion, kio sin metis en ĝian vojon. Pro la amatino li estus riskinta la plej altan danĝeron, pro ŝi li estus fariĝinta mizera kaj kulpa.

Ĉu lia edzino lin same amis? Li ne sciis tion, sed pli malfrue li devis ekkoni, ke ŝi pro lia riĉeco, pro lia gloro, alkatenis sian vivon al la lia, kaj ke malfideleco estis en ŝia koro. Tiutempe la majstro pentris bildon de Kristo kaj Luigi Grumello, juna Veronano, staris al li kiel modelo. Jam trifoje la majstro finpentris la bildon kaj trifoje li ĝin forjetis, ĉar ĉiam ankoraŭ li ne sukcesis pentri la okulojn de la Savinto tiel plenaj de doloro, de kortuŝa akuzo, kiel li ilin vidis en la animo. Tiu ĉi bildo estis destinita fariĝi lia majstrolaboro, li volis prezenti la plejalton de tio, kion kapablis lia peniko; la plej emociigan, kion pentrista mano iam kreis.

Kaj la ambicio konsumadis lian koron kaj malheligis lian rigardon tiom, ke li ne vidis kiel la malfideleco transpaŝadis la sojlon de lia domo kaj tiel, ĉe la tablo de lia amo senhonte sidis fremdulo gaste.

Iun tagon li forjetis flanken senkuraĝigita la paletron kaj forlasis la domon por promeni iomete laŭ la bordo de Adiĝo kaj por kolekti freŝajn fortojn por nova kreado; sed kiam li neatendite estis revenanta, tiam — —", el la brusto de la maljunulo elpuŝiĝis kvazaŭ turmentiga ekkrio — „tiam li trovis sian edzinon en la brakoj de tiu Grumello".

Pli profunden malleviĝis la kapo de la pilgrimanto sur la bruston, kaj ŝajnis al mi, ke traflugis tremskuo lian korpon.

„Daŭrigu rakonti maljunulo,“ mi petis milde, „la kulpo de homo ne estas tiom granda, se li estas pekinta pro perfida amo.“

El liaj profundkavaj okuloj min trafis dankplena rigardo antaŭ ol li daŭrigis: „Jes fremdulo, lia kulpo estis granda; ĝi superkreskis lin tiamaniere, ke li rompiĝis sub ĝi.“

Konsumanta, kiel pli frue lia amo, fariĝis nun lia malamego, kaj nur unu vorto vivis ankoraŭ en lia koro: „Repago!“

Time, konscia pri sia kulpo, la perfidulino ŝteliris eksteren, kaj la majstro restis sola kun tiu, kiu ruinigis lian feliĉon. Nur unu deziro lin regis: per tiu ĉi junulo li volis puni kaj vundi la malfidelan, ĉar sufero de tiu ĉi estis ja ankaŭ ŝia sufero. Kvazaŭ li nenion estus vidinta, kaj kvazaŭ lia koro ne konus venĝon, trankvile li invitis la junulon reokupi la lokon, kaj kiam Grumello staris sur malgranda podiumo antaŭ la kruco, li kiel kutime ligis liajn brakojn kaj krurojn sur la lignan krucon per larĝaj zonoj. Kio en tiu momento estis okazanta en lia animo, tion mi ne povas priskribi, ĉar vi tion ne komprenus, se vi ne elportis la saman suferon.

Mortigita estis en li ĉiu sento de kompato kaj de pardono; mortigita ankaŭ ĉiu timo antaŭ la ĉiela repago. Puŝata de interna devigo li eliris kaj alportis martelon kaj najlojn — kaj li najlofiksis la junulon al la kruco.

La turmentoj de lia viktimo ne tuŝis lin, eĉ ne la petegoj de la dolore konvulsiiĝinta buŝo; ne, kiam en muta senespera akuzo ekmortis la okuloj de la junulo, tiam ekprenis la majstro la penikon kaj la paletron, kaj sur la tolo naskiĝis tiu vizaĝo, kiu allogis kaj emociigis vin, kiu estus alportinta al la majstro la plej altan gloron kaj kiu faligis lin en la plej krudan kulpon.

La edzino mortis senhonora kaj forlasita; antaŭ sia morto ŝi donacis ĉi tiun bildon al la ĉi tiea kapelo — sed neniu scias ĝian historion!“ „Kaj la majstro?“ mi demandis hezite.

„Li trovis nek lokon, nek ejon, por kuŝigi sian vojlacan kapon, lin pelas la kulpo kiel ekziliton trans la montoj kaj valoj, ĝis iam la Eternulo difinos lian lastan horon.“

„Fartu bone, fremdulo, al mi estas malpermesite iri Veronon — kaj vi akceptu dankon por via donaco!“

La fremda pilgrimanto apud mi estis malaperinta kaj la mallumo englutis liajn paŝojn. Flagre estingiĝis la finbrulinta kandelo; sed min blovtuŝis kvazaŭ malvarmiga elspiro kaj pli alpreme mi kuntiris mian mantelon ĉirkaŭ miaj ŝultroj. Ekstere fariĝis nokto, en malproksimo brilis la lumoj de Verono kvazaŭ signalaj steloj al la fortika migrulo kiel konsolanta saluto.

LA KONGRESO VIDATA TRA OKULVITROJ DE ŜERCULO.

Nia plej malnova organo — Lingvo Internacia) — surprizis siajn legantojn per triobla numero 8., 9., 10., kiu entenas raporton pri la kongreso verkitan en tute alia maniero ol estas tiu, kiun ni estas kutimintaj legi en la oficialaj presaĵoj. Kiu estas amiko de rido kaj de ŝerco, legu tiun ĉi raporton! Ni volas instigi per kelke da elĉerpataj fragmentoj niajn samideanojn, ke ili klopodu tralegi la tutan verkon, kiu certe tion meritas. (En la teksto ni volas tamen atentigi pri io, kio ne plaĉas al sincera kritikisto: Pĝ. unua: La solan instrukcion, kiun mi ĝonis(,) estis. Sendube oni legu: La sola instrukcio . . . Pĝ. 300: La pordo malfermiĝante, mi konscias. Kiam la pordo estis malfermiĝanta . . . (malfermiĝis). Pĝ. 373: S-o N. forgesinte alporti la pasporton . . . Y ne povis akcepti . . . Ĉar s-o N. forgesis . . .).*

Je la naŭa komuna festmanĝo en la salono de „Pafista Societo“.

Amiko diris al mi: „Ne venu tro malfrue, por havi bonan lokon ĉe tablo“. Kvaronon antaŭ la naŭa mi transiris la stratan pordon. En la vestiblo oni prenas mian pluvombrelon (kosto: 20 heleroj). Mi eniras la salonon kaj vidas . . . neniun tablon. Nur laŭlonge de unu el la muroj, longa, mallarĝa tablo estas kovrita de malvarmaj manĝaĵoj. Kredeble oni ne ankoraŭ dismetis la tabletojn. Ni venis tro frue; ni atendu. Iom post iom la salono pleniĝas, samideanoj en jaketo, samideanoj en frako, samideanoj en simplaj roboj, samideaninoj en festroboj. La babilado komenciĝas kaj la bruo de la konversacioj fariĝas pli kaj pli laŭta, sed neniu tablo aperas. Subite mi ekvidas sur tablo en antaŭsalono glasetojn da brando kaj ŝinkobulkojn. Bona afero! Estas la antaŭmanĝo, difinita por akrigi la apetiton; sed mi devas konfesi, ke je ĉi tiu malfrua horo mia apetito estis jam tre akra. Ni antaŭmanĝu! Mi revenas en la salonon, sed ankoraŭ neniu tablo!

Nur la morgaŭan tagon mi legis en la Kongresa Bulteno, ke mi ĉeestis „Raŭton“. Ĉu vi konas Raŭton? Estas tre amuza ludo. Por „raŭti“, estas necesa granda, kvarangula salono; en ĉi tiu salono vi metas apud unu el la muroj grandan tablon kun diversaj manĝaĵoj. Sur la libera loko staras la ludantoj, kies parto devas esti frake vestita; post signalo (trumpeto aŭ orkestro aŭ krio: antaŭen Esperantistoj!) la ludantaro marŝas al la tablo kaj amase ĝin ĉirkaŭas. Laŭ la regularo oni devas alproksimiĝi al la tablo, preni teleron, meti sur ĝin pecon da viando kaj salaton. Poste oni devas trairi la amason, kiu vin premas kaj vin puŝas, kaj iri al malproksima parto de la salono, nenion disŝutante, precipe sur la frakulojn dislokitajn en la amaso. Kaj ne estas ĉio: oni devas ankoraŭ iri al alia malproksima parto de l'salono, por preni glason da biero aŭ da siropo, kaj reveni en sian antaŭan lokon nenion disverŝante.

La ludo estas tre amuza, precipe kiam malvarma guto da biero falas sur la nudan kolon de sinjorino aŭ kiam guto da ruĝa siropo venas makuli la blankan ĉemizan antaŭaĵon de sinjoro. En

---

*) „L. I.“ aperas de la jaro 1895. Jare 5 K. Paris, 33, rue Lacépède.

tia okazo la malbonaj ludantoj koleriĝas, sed la bonaj dolĉe ridetas. Precipe la frakuloj havas tre malbonan karakteron, ili faras teruran mienon, kiam oleita salato flugas al ilia frako.

Efektive, post signalo donita de la orkestro, la ludo komenciĝis, kiel dirite. Mi estis tre malbona ludanto, mi ne volis movi mian teleron kaj manĝis sur la tablo, mi ne volis movi mian glason kaj trinkis apud la fonto de biero. Laŭ tio, kion mi aŭdis, la gajninto estis S-o Bourlet, lerta por jongli kun ciferoj kaj ekvilibri buĝetojn; la malgajninto estis iu samideano vestopurigisto, kun kvin frakoj makulitaj, ok jaketoj malpurigitaj kaj mi ne scias, kiom da sinjorinoj bierumitaj.

Samtempe oni konstatas, ke la Esperantistaro ne malŝatas la bonan manĝaĵon. En angulo, S-ro Grabowski englutas ĉiuspecajn bonaĵojn. Kaj oni miras, kiam oni pensas, ke ĉi tiuj bonaĵoj aliformiĝos en belajn versojn. Nenio perdiĝas en la naturo. En mezo de la salono, D-ro Zamenhof ĉiam afabla, ĉiam nelacigebla, surskribas subskribojn. Li surskribas sur kajerojn, sur albumojn, sur ventumilojn, sur rubandojn, sur la plej strangajn objektojn. Se li pagigus siajn surskribojn, kia fonto da enspezoj por niaj malriĉaj oficialaj institucioj! Sed nun la stomakoj estas plenaj kaj la bareloj malplenaj, Oni revigliĝis, la kruroj fariĝas agitemaj kaj baldaŭ paroj komencas turniĝi. Balo organiziĝas kaj daŭris ĝis malfrua horo. Kredeble jen la kaŭzo de la netableco.

. . . .

Jus komenciĝis la kantado de S-ino Ada Sari, kiu havas en la gorĝo mi ne scias, kiom da najtingaloj kaj silvioj. Tondrego de aplaŭdoj tradukas la sentojn inspiratajn al la aŭskultantaro de ĉi tiu magiistino.

Sed kio tuj okazos? Junuloj formas duoncirklon sur la scenejo; meze de ili oni metas malaltan keston, sur la kesteto stariĝas maljuna sinjoro kun bastono en la mano. Subite la maljunulo kolere levas la bastonon kaj per ĉiuj fortoj batas al la kapoj de la junuloj, kiuj tuj komencas krii. Sed kredeble la doloro ne estis granda, ĉar la krioj estas tre agrablaj, eĉ muzikaj. Kaj la malbona sinjoro sur la kesteto daŭrigas la gestadon. Jen li minacas dekstren, jen li minacas maldekstren, kaj ĉiufoje la minacata flanko krias kaj la ne minacata silentas. Momente li stariĝas sur pinto de la piedoj kaj movas brakojn kiel flugilojn; poste li pene levas imagan ŝarĝon; fine li faras rapidan geston per la manoj kvazaŭ li jetus pipron en la okulojn de la malfeliĉuloj; ĉi tiuj ellasas lastan plendon kaj silentas. La malbonkora publiko aplaŭdas ĉi tiun kruelan sporton, kaj la barbara maljunulo senhonte salutas. La programo klarigas al mi, ke mi jus aŭdis la „Krakovan viran horon" kaj ke la direktoro ne estas sinjoro barbara, sed S-ro Barabasz.

Ĉi tiun vesperon okazis ankaŭ kunveno de la Psikistoj. Oni diskutis pri mediumo; kiu en stato konvena parolas per tute nekonata lingvo. Unue oni kredis, ke ĉi tiu lingvo estis ĥina aŭ japana, sed estis eraro; poste oni pensis pri la lingvo de la libro Zend Avesta, ankaŭ tio ne estis; fine psikisto tre klera pri malnovaj lingvajoj eltrovis, ke ĉi tiu stranga idiomo estas Ido . . . en sia stato ĉirkaŭ la 1-a de Julio 1912. Kredeble Idisto tre lerta (povanta paroli sian lingvon), mortis en ĉi tiu epoko, kaj hodiaŭ lia spirito per buŝo de la mediumo parolas ĉi tiun Idon, hodiaŭ

nekompreneblan pro la multaj plibonigoj faritaj de post ĉi tiu malproksima dato.

. . . .

Nun venu ĉi tien, sinjoro Reĝisoro, mi tuj „lavos al vi la kapon“.

Vi scias (pli bone ol mi), kiom estas delikataj kaj malfacilaj la vere tragediaj scenoj, kiel la lastaj scenoj de Mazepa; ĉi tie ni estas en la belegeco, kaj inter la belegeco kaj la . . . ridindeco estas limo pli maldika, ol la paperfolio, sur kiu mi skribas. Pli ol unu fojon, dum la lasta akto mi tremis, timante, ke oni transpasos ĉi tiun teruran limon. Kaj nur vi, sinjoro Reĝisoro estis kulpa pri tio. Unue, ni vidis dum la unuaj aktoj grandan vivantan Zbignjev, kaj nun vi alportas tute malgrandan ĉerkon, en kiu estas neeble meti pli ol duonon da Zbignjev. Kie oni metis la alian duonon? Kaj ĉi tiun ĉerketon oni kuŝigas en grandega salono tute lumigita, kie ĝi similas forgesitan skatolon da domenoj! Due, la vojevodo faras per ĉi tiu skatolo ĉiuspecajn gimnastikajn ekzercojn, li ĝin metas laŭlarĝe, laŭlonge, oblikve, li ĝin tiras, puŝas; momente mi ne plu sciis, ĉu ni estis en la palaco de la vojevodo aŭ en Krakova stacidomo, ĉambro de la pakajoj. Feliĉe vi havis, kiel ĉeestantojn, bravajn Esperantistojn, kiuj nur deziras aŭdi sian karan lingvon kaj ne multe atentas pri materialaj detaloj. Tamen, sinjoro Reĝisoro, grandigu vian ĉerkon, malgrandigu kaj mallumigu vian scenejon kaj iom ŝanĝu la aranĝon de via lasta akto. El Parizo, kie ripozas liaj restajoj, Słovacki mem vin benos.

Mi ne povas kritiki la sufloron, ĉar mi lin tute ne aŭdis; kredeble la aktoraro neniam bezonis lian helpon.

. . . .

En la ĝardeno de la Ekspozicio la fotografa manio de la kongresanaro atingas la paroksismon. La oficialaj fotografistoj estas ĉi tie kun ĉiuspecaj fotografiloj, unuj sur altaj tripiedoj (kredeble por fotografi personojn je fenestroj de unua etaĝo), aliaj preskaŭ sur tero (kredeble por fotografi kelistojn je fenestretoj de ilia kelo). Kaj oni fotografas samnacianojn, oni fotografas samprofesiulojn, oni fotografas samkreskulojn, oni fotografas samaĝulojn, oni fotografas sama-nombro-da-harulojn, oni fotografas samulojn elektitajn ĉiumaniere kaj eĉ neniumaniere. Kaj meze de ĉiu grupo sidas la afablega kaj bonega Doktoro, ĉiam ridetanta, ĉiam nemoviĝanta, ĉiam rigardanta rekte la fotografilon. Sinsekve li fariĝas Hungaro, Japano, juristo, poŝtisto, du-metrulo, dekokjarulo kaj eĉ pacifista sinjorino. Feliĉe je la kvina finiĝas lia turmentiĝo kaj ĉiuj kongresanoj, fotografitaj aŭ ne fotografitaj, sidiĝas duonronde ĉirkaŭ la muzika estrado por ĉeesti la Disdonon de Premioj de la „Literatura Konkurso“ organizita de nia bonega kolego Pola Esperantisto. ***Ned Katryn.***

JAZYKOVÝ RÁDCE — LINGVA FAKO.

Pri prepozicio antaŭ infinitivo: Ĉiu prepozicio laŭ sia logika esenco povas esti uzata nur antaŭ substantivo. Sekve, se antaŭ vorto, kiu havas verban sencon, ni deziras uzi prepozicion, ni devas doni al tiu verbosenca vorto formon de substantivo, ekz.

anstataŭ „kun saluti“, „sen respondi“ ni devas diri „kun saluto“, „sen respondo“. La vortoj *„por“* kaj *„anstataŭ“*, uzataj kun infinitivo, ne havas la sencon de puraj prepozicioj, sed preskaŭ de konjukcioj kaj neeble estas uzi post ili substantivojn. - **O předložce před neurčitým způsobem slovesným:** Každé předložky podle její logické podstaty může se užívati pouze před podstatným jménem. Proto, chceme-li užíti předložky před slovem, které má význam slovesný, musíme dáti tomuto slovu tvar jména podstatného, na příklad na místo „kun saluti“, „sen respondi“ musíme říci „kun saluto, sen respondo“. (Pozn. Srov. s češtinou!!) Slova *„por“* a *„anstataŭ“* užívaná s neurčitým způsobem, nemají smyslu pouhých předložek, ale skorem spojek a není možno užívati po nich podstatných jmen (na př. *por paroli kun vi*; nikoliv *por parolo*).

Pri adverbo prepozicia: Tia adverbo devenanta de verbo transira, kiu postulas akuzativon, estas uzata kun akuzativo, ekz. *koncerne tion, rilate tion.* Se ĝi devenas de vorto postulanta post si prepozicion, ĝi ankaŭ akceptas post si prepozicion, ekz. kaŭze *de* tio, responde *al* via demando. Se ĝi estas vorto ne devena, sed originala, kiu per si mem havas la sencon de prepozicio, tiam ĝi, kiel ĉiu alia prepozicio, ligiĝas kun la substantivo senpere, t. e. sen alia prepozicio kaj sen akuzativo, ekz. *spite* mia malamiko. Cetere en ĉiu *duba* okazo, oni povas uzi la prepozicion *je* post la adverbo prepozicia, aŭ la akuzativon sen prepozicio. - **O příslovci předložkovém:** Takové příslovce, které jest odvozeno od slovesa přechodného, vyžadujícího pád čtvrtý, váže se s pádem čtvrtým, na př.: *koncerne tion, rilate tion.* Je-li odvozeno od slova vyžadujícího po sobě předložky, přijímá rovněž za sebou předložku, na př.: kaŭze *de* tio, responde *al* via demando. Je-li to slovo neodvozené, ale původní, které samo sebou má smysl předložky, pak stejně jako každá předložka se váže se jménem podstatným bezprostředně, t. j. bez jiné předložky a bez čtvrtého pádu, na př. *spite* mia malamiko. Ostatně v každém pochybném případě lze užíti předložky *je* po příslovci předložkovém nebo pádu čtvrtého bez předložky.

Pri infinitivo post verbo: Oni uzas la infinitivon nur en formo de rekta komplemento (ekzemple „mi amas danci“), aŭ en formo de nerekta komplemento kun la prepozicioj *por*, *antaŭ* (*ol*), *anstataŭ*. En ĉiuj okazoj, kiam oni bezonas uzi la infinitivon kun iu alia prepozicio, oni devas uzi anstataŭ ĝi *participon* aŭ *substantivon kun prepozicio* (ekz. „li foriris, ne preminte lian manon,“ aŭ „sen premado de lia mano“ anstataŭ „sen premi lian manon“). - **O způsobu neurčitém po slovese:** Neurčitého způsobu užíváme pouze ve tvaru přímého doplňku (na př. „mi amas danci“) nebo ve tvaru nepřímého doplňku s předložkami *por*, *antaŭ* (*ol*), *anstataŭ*. Ve všech případech když máme užíti neurčitého způsobu s nějakou jinou předlož-

kou, musíme užíti místo ní *přechodníku* nebo *podstatného jména s předložkou* (na př. „li foriris, ne preminte lian manon" nebo „sen premado de lia mano" místo „sen premi lian manon").

Pri la akuzativo post verboj de movo: Kvankam estus ordinare pli ĝuste uzi post tiaj verboj la substantivon aŭ pronomon en akuzativo, oni tamen ofte povas uzi sen eraro ankaŭ la nominativon, se la senco de direkto koncernas ne la substantivon aŭ pronomon, pri kiu ni parolas, sed ian alian subkomprenatan vorton; ekzemple oni povas tute bone diri „oni metis antaŭ *mi* manĝilaron", komprenante sub tio: „oni metis antaŭ mi *sur la tablon* manĝilaron". Post „sidiĝi" ni povas uzi la akuzativon, se ni volas esprimi *movon* kaj la nominativon, se ni volas esprimi komencon de nova *stato*. En dubaj okazoj preferinda estas la nominativo. - **O čtvrtém pádu po slovesech pohybu**: Ačkoliv bylo by obyčejně správnějším užíti po takových slovesech jména podstatného nebo náměstky v pádu čtvrtém, lze přece často užíti bez chyby také pádu prvního, nevztahuje-li se smysl směru ke jménu podstatnému nebo náměstce, o níž mluvíme, nýbrž k nějakému jinému slovu, které se pod tím vyrozumívá, na př. můžeme zcela dobře říci „oni metis antaŭ *mi* la manĝilaron", rozumějíce tím „oni metis antaŭ mi *sur la tablon* manĝilaron". Po „sidiĝi" můžeme užíti pádu čtvrtého, chceme-li vyjádřiti *pohyb*, a prvního, chceme-li vyjádřiti začátek nového *stavu*. V případech pochybných jest dáti přednost 1. pádu.

Pri „de" post participoj pasivaj: Post pasivaj participoj la prepozicio *de* ĉiam montras la *aganton*. Uzi post pasiva participo simplan prepozicion *de* en ia alia senco ni devas ĉiam eviti. - **O „de" po příčestí trpném**: Po trpných příčestích předložka *de* naznačuje vždy činitele. Musíme se vždy vyhnouti použití pouhé předložky *de* po příčestí trpném v jakémkoliv jiném smyslu.

Pri „per" post pasivo: Ĝi estas uzebla nur antaŭ vorto, kiu esprimas *ne la aganton mem*, sed *rimedon* uzitan de iu *alia* aganto. (La vorto post *de* en pasiva frazo fariĝas subjekto, se oni aliformigas la pasivan frazon en aktivan.) Oni devas diri: „*la* tero estas kovrita *de* neĝo (ne *per*), ĉar ne *iu* kovris la teron *per* neĝo, sed la neĝo mem estis la *aganto* kaj kovris mem la teron. — **O „per" po tvaru trpném**: Lze ho použíti pouze před slovem, které nevyjadřuje *činitele sama*, ale *prostředek* použitý jiným činitelem. (Slovo následující po *de* ve větě trpné stává se podmětem, změníme-li větu trpnou v činnou). Musíme říci: „la tero estas kovrita *de* neĝo" (ne *per*), protože nepokryl *někdo* zemi sněhem, ale sníh sám byl *činitelem* a pokryl sám zemi.

Pri la akuzativo post „tra": La prepozicio *tra* (kaj ankaŭ la prepozicio *kontraŭ*) apartenas al tiuj prepozicioj, kiuj per si mem ne montras almovon, kiel montras ekzemple la prepozicio *al*. Tial

oni povas en okazo de almovo uzi post ĝi akuzativon, kvankam la diferenco inter *tra* direkta kaj *tra* sendirekta ne estas tiel granda, kiel ekzemple inter *en* direkta kaj *en* sendirekta. - **O čtvrtém pádu po „tra“ (skrze)**: Předložka *tra* (a také předložka *kontraŭ* naproti) patří k těm předložkám, které samy sebou nenaznačují pohybu k čemu, jako naznačuje na př. předložka *al*. Proto můžeme v případě pohybu směrem k čemu použíti po ní pádu čtvrtého, ačkoliv rozdíl mezi *tra* směrovým a *tra* beze směru není tak veliký, jako na př. mezi *en* směrovým a *en* beze směru.

SEN TITOLO.

En Eŭropo estas 78 ŝtatoj (46 monarĥioj kaj 32 respublikoj). — Sub la tero laboras kvin milionoj da homoj, inter ili du milionoj en Granda Britujo, kvaronmiliono en Aŭstrio; plejparte ili okupiĝas per karbominado. — La plej alta distanco, kiun la aviadistoj atingis per balono, estas dek kilometroj. Per aeroplano oni jam leviĝis je 5600 m. La sono atingas ĝis kvar mil metroj. Ĉar la superaj tavoloj de aero estas malpli densaj, la sono tie pli facile vastiĝas: ĝis 3000 m. estas aŭdebla la fajfo de lokomotivo, ĝis 1600 la kanto de koko, ĝis 1000 la voĉo de homo. En mala direkto, malsupren, la voĉo de aviadisto estas sur la tero aŭdebla sole el alteco de 100 metroj. — En la gazeto „Le Monde Espérantiste“ estas konsilo, kiel oni povas fariĝi magneta montrilo: kuŝiĝu sur ligna tabulo, kiu estas meze subapogita je 40 cm. alte super la tero per stango tiel, ke ĝi povas libere turniĝadi. Post iom da oscilado la tabulo haltas, montrante al nordo kaj al sudo. Kiu provos? — Vojaĝo ĉirkaŭ la mondo estas jam plenumebla en 39 tagoj por suma elspezo 6060 Fr. La veturprezoj 2880 Fr. — La radiumo estas nun la plej kara materio en la mondo: unu gramo kostas 600.000 K. La plej grandan kvanton liveras la minejoj en Jáchymov en Bohemujo, kie ĉiujare oni fabrikas unu kaj duonon de gramo. En la mondo estas nun dekdu gramoj, el kiuj kvar gajnis sinjorino Curie en Parizo, ok Dr. Ulrich en Jáchymov.

La Panama kanalo. Antaŭ nelonga tempo ni skribis pri la granda verko de teknikaj geniuloj, kiu apartigas Afrikon de la azia kontinento, pri la Sueza kanalo. Post unu aŭ du jaroj preparas la Amerikanoj inaŭguracion de alia simila verko, de la Panama kanalo, kiu, kuŝante meze inter la Norda kaj Suda Amerikoj, tranĉas la istmon larĝan tiuloke 56 km. La kanalo, ekkonstruita de Francoj sed finkonstruata de Amerikanoj, kostis 400 milionojn da dolaroj (1 dol. valoras 5 K) kaj estas longa 73 km. Kvardek mil homoj laboris pri forigo de 140 milionoj da kubaj metroj da materialo; la plej gravajn malhelpaĵojn dum tiu ĉi laboro prezentis la vulkaneca, nefirma tereno kaj la danĝerega febra malsano, kiu en tieaj marĉaj regionoj mortige furiozadis. Ĉe la kanalo elkreskas protektaj fortikaĵoj kaj nova urbo, kiun oni nomis je honoro de la malkovrinto de la Pacifika Oceano „Balboa“. Simile elkreskis ĉe la Sueza kanalo urbo Port Said. La ŝipoj povos nun post 10 horoj da veturo trapasi el la Atlantika Oceano en la Pacifikan, ne bezononte plu ĉirkaŭveturadi la tutan kontinenton sudamerikan.

Radikala helpo **kontraŭ tuberkulozo** estas, laŭ esploroj de nia samideano dr. Šípek, sole profilaksia procedo de la personoj facile infektiĝemaj, kiu bazas sur forigo de infanoj cedemaj al tiu ĉi malsano el la klimato. Ĉe siaj vojaĝoj tra la tuta mondo li trovis kiel la plej taŭgan restadejon por la nomita celo la dezertojn Egiptajn, kie li tiucele elektiĝis (proksime de Kairo). En moderna domo li fondis laŭ interkonsento kun la direktoro de tiea lernejo instituton en kiu estas akceptataj infanoj 5—19jaraj, kiuj pro malsano aŭ alia kaŭzo malfortiĝis, sed je kiuj ne montriĝas ankoraŭ simptomoj de iu infekta malsano. Ĉiu infano estas instruata en sia gepatra lingvo pri iu ajn okupo, arto aŭ scienco. Por pacientoj, kiuj suferus pro varmo, estas je dispono alia stacio, en la libana valo aŭ, dum somero, la moravia banloko Luhačovice, kie dr. Šípek pasigas la someran sezonon. Post kelka tempo li projektas fondi internacian akcian societon. kies membroj — personoj, korporacioj, urboj — garantius per sia subteno (ĉe 4% profito) prosperon de la instituto. La iniciatoro mem rifuzas partopreni je materiala profito kaj volas ĉiun gajnon de sia instituto disponigi al novaj, neriĉaj pacientoj. Kompreneble, estos en tiu ĉi poliglota entrepreno bezone multe da kunlaborantoj kaj Esperanto povos refoje montri sian utilecon. N. B. La instituto havas nenion komunan kun la privata Pensiono de dr. Šípek en Heliopolis aŭ en Luhačovice, kie estas kuracataj maturaĝuloj.

S-o J. Hebký el Kukleny, kiu antaŭ kelkaj monatoj ekiris **piede al Peterburg**, skribas al ni: Mi iris piede kaj per vagonaro; tiu vojaĝo daŭris pli ol 4 semajnojn. Sur la rusa limo oni konfiskis al mi ĉiujn esperantajn gazetojn, eĉ „Časopis Českých Esperantistů“. Dum la vojo mi estis ĉie tre bone akceptita kiel bohema Esperantisto. Sed mi tamen konsilas neniun vojaĝi piede tra Rusujo, ĉar tio estas tre danĝera. Mi estis kaptita kiel spiono en Grodno sed post du horoj oni liberigis min. Ĉio iris tre malbone, ĉar mi havis kune fotografilon, landkartojn kaj presaĵojn kaj oni ĉion trarigardis. Nun estas ĉi tie novaj esp. kursoj, kien mi estas invitita.

Stranga antaŭdiro. Antaŭ kelke da jaroj renkontis nederlanda limdepagisto sur la nederland-germana limo maljunan virinon, kiu deziris transiri la limon; ĉar ŝi nenion deklareblan kunportis, okazis interparolo pri la vetero, dum kiu la virino antaŭdiris, ke la jaro 1911 estos sekega, la jaro 1912 pluvoriĉega kaj la jaro 1913 sanga. De post tiu tempo oni ne plu vidis la virinon, ĝis la komenco de la nuna monato novembro 1912. La sama oficisto renkontis ŝin kaj tuj ili rekonatiĝis. Li gratulis ŝin pro ŝia supernatura antaŭvidemo kaj ŝin demandis: Ĉu vi nepre kredas, ke la jaro 1913 estos sanga? Ŝiaj grizaj okuloj kvazaŭ kate ekfulmetis kaj anstataŭ respondi ŝi demandis: Kia estas via opinio pri la nuna milito en la sudorienta parto de Eŭropo? Ĝisatendu kaj atentu la okazontaĵojn dum la venonta jaro, kaj se plaĉos al Dio, ni iam vivaj kaj sanaj refoje interparolados. — Sed kiu vi estas? De kie vi venas? Kien vi iras? — La sendenta buŝo de la virino tiel larĝe malfermiĝis, ke ĝi preskaŭ atingis la orelojn kaj la pinto de la kurba nazo ŝajnis atingi la antaŭen direktiĝantan pinton de la mentono. Kiu mi estas — estas negrava. Je tiu demando eĉ imperiestro Vilhelmo I. vane atendis mian respondon. — Ĉu vi tiun imperiestron konis? — Mi ne sole parolis kun li sed mi eĉ antaŭdiris al li diversajn okazontaĵojn de lia venonta vivo. Tiam li ne

estis ankoraŭ fariĝinta imperiestro. — Kaj ĉu la profetaĵo montriĝis ĝusta? — La plej lasta parto ne atingis ankoraŭ sian templimon. Sed pri la aliaj juĝu vi mem: Mi renkontis en la jaro 1849 Vilhelmon, kiu fariĝis tiam guvernisto de Rejn- kaj Vestfallando, apud Koblenz, kie li estis ĉasanta. Vilhelmo haltigis min kaj demandis, de kie mi venas. Mia respondo, kiel al mi ŝajnis, ne kontentigis lin, sed mi ne atentis pri tio. Eksciinte, ke mia plej granda ĝojo estas la profetado, li ekridegis je mi, same kiel vi faris antaŭ kelkaj jaroj. kiam mi, por pruvi mian arton, ĝuste diris al vi kiom da mono kaj kiaspecan monon vi posedis en via monujo. — La imperiestra familio tre volonte donus al mi grandan monsumon, se mi refoje min prezentus al la korto. Sed vane . . . La lastan frazon la virineto elparolis kun aplombo de granda memkonscio kaj sekretemo, tiel, ke la doganisto pli kaj pli forte interesiĝis pri la afero. Jen, kion mi tiame enskribis en la poŝlibreton de Vilhelmo; ĝis nun oni konservas la libreton en la palaco de Potsdam. Unue la jaron kurantan — 1849, sube la sumon de ĝiaj ciferoj, t. e. 22, alkalkulite, rezultas 1871. En tiu jaro, mi antaŭdiris, fariĝos Germanujo imperio kaj vi, Vilhelmo, estos la unua imperiestro. La virino interrompis la rakonton dum momento, ektusetis kaj daŭrigis: Vilhelmo nekredeme ekridetis je mi, sed tio ne ĝenis min. Refoje mi skribis: 1871; sumo de la ciferoj 17, alkalkulita, donas rezultaton 1888: en tiu ĉi jaro la morto forprenos vin el la rondo de viaj amikoj. Poste mi faris la saman procedon per la nombro 1888: la sumo de ciferoj estas 25, post adicio rezultas 1913. Sub tio mi ankaŭ enskribis profetaĵon . . . — La doganisto tre deziris kaj ĉiumaniere penis ekscii, kion ŝi profetis pri 1913, sed la sola respondo estis: Tion ankaŭ treege ŝatus scii la nuna germana imperiestro kaj tial li tre ŝatus min renkonti, ĉar la folieto, sur kiu estis surskribita la profetaĵo por 1913, perdiĝis iel el la poŝlibreto de la imperiestro kaj nun sole mi kaj neniu alia scias la sekreton. (Laŭ nederlanda lingvo tradukis Adr. Meys en Tilburg.)

Interesa estas, ke ankaŭ ĉe ni oni rakontas la saman historieton, sole kun tiu diferenco, ke oni pretendas scii la enhavon de la perdiĝinta folieto . . .

AŬSTRIA ORGANIZAĴO?

Ni ricevis de s-o P. K. Geier en Graz artikolon, kiu entenas inspirojn kaj proponojn por kreo de ia institucio, laŭ lia opinio bezona por pli vigla propagando ĉe la ŝtataj oficoj. Li proponas fondi ĉe la projektata „aŭstria tago“ okazonta en Graz dum Pentekosto 1913 ian aŭstrian ligon, por kiu la nacioj elektadus siajn reprezentantojn, preskaŭ laŭ modelo de la Rajtigitaj Delegitoj, kiuj havus la rajton paroli antaŭ la registaroj en nomo de la tutaŭstria Esperantistaro. Por financi la elspezojn de tia organizaĵo, li proponas, ke la naciaj unuiĝoj pagu kotizaĵon, ekz. 10 h. por ĉiu Esperantisto. La proponanto turnas sin al ĉiuj grupoj kaj samideanoj kun la peto, ke ili priparolu detale lian projekton, skribu pri ĝi en la propagandaj ĵurnaloj kaj kiam la projekto estus matura, ke ili starigu provizoran regularon kaj programon, pri kiu oni povus en Graz decidi.

La komitata kunveno de B. U. E., okazinta la 20. X. 1912, pridiskutis detale la projekton kaj decidis respondi al s-o Geier rifuze. La tekston de la respondo ni represas:

. . . „La ĝisnunaj spertoj, kiujn ni akiris en rilato kun la aŭstriaj Esperantistoj germanaj, neniel donas al ni la esperon, ke iu „organizaĵo tutaŭstria" povus esti fruktodona; jen la motivigo: Ĉe la „Unua Esp. Aŭstria Tago" en Wien ĉeestis 60 Bohemoj (Unianoj) inter 105 ĉeestantoj. La „Duan Tagon" — en Praha — la Germanoj ignoris kaj malebligis sekve ĉian diskutadon en ĝi. La motivon por tiu ĉi ago ili trovis en tio, ke la organizinto (B. U. E.) rifuzis la enirrajton al tri el siaj samnacianoj, kun kiuj ĝi neniam kaj nenie plu estas decidiĝinta rilati. Tiu konduto de la flanko de la Wiena Unuiĝo nin surprizis tiom pli multe, ĉar ĉe la Unua Tago en Wien sama afero okazis inter la vicoj germanaj: oni malpermesis eniron al du konataj samideanoj. Ni, Bohemoj, konsiderinte la aferon privata de la aranĝintoj, kvankam ni estis en plimulto, tamen ni eĉ ne provis malebligi la traktadon. Jen fakto! Kvankam oni decidis ĉe la Unua Tago ĉion pri la tuta Aŭstrio pritrakti en konsento de ĉiuj nacioj aŭstriaj, tamen la germanaj samideanoj wien'aj ne konsideris sin ligataj de tio kaj laboris tute private pri eldonaĵo tutaŭstria — la Pejzaĝoj. Legu pri tio en „Časopis Českých Esperantistů". Jen alia fakto! Legu ankaŭ niajn proponojn en Č. Č. E. 1910 n-o 4. Vi trovos, ke Via inspiro estas neniel nova.

Pri la propono, ke „ni kreu konstatan delegacion de la aŭstriaj unuiĝoj aŭ de la tutaŭstria esperantistaro", ni diras:

1. Ne ĉiuj nacioj en Aŭstrio posedas ankoraŭ tiel potencajn unuiĝojn, kiel estas ekz. Bohemoj kun sia B. U. E.

2. La spertoj suprecititaj ne logas nin, ke ni partoprenu je tiaj organizaĵoj.

3. Ne estas laŭ nia opinio bezone kolektadi novajn kotizaĵojn, ĉar, se venos komunaj demandoj, ni povas ilin skribe interŝanĝi — en plej oftaj okazoj la korespondo rilatos komunan subskribon de iu petskribo, adresota al ministerioj. Por tiu celo ne estas bezone fondi iun novan „Aŭstriajon", kontraŭe ni pensas, ke la impreso estos pli efika, se la ministerio vidos, ke la aŭstriaj nacioj per siaj unuiĝoj en konsento kunlaboras.

4. En ĉiu okazo ni volas subtenadi komunajn entreprenojn per nia konsento aŭ subskribo kaj frate interrilatadi kun ĉiuj nacioj kiel egalvaloraj centroj."

Kelkaj rimarkoj povas esti utilaj, por ke nia vidpunkto estu ĝenerale komprenata: Ni, bohemaj Esperantistoj, sentas en ni ankoraŭ tiom da propra konscio, ke nin ofendas la maniero, kiun arogas al si la aŭstriaj Germanoj: antaŭ la tuta mondo fanfaroni per laboro de aŭstriaj nacioj, ankaŭ la negermanaj, kiuj reprezentas pli ol 65% de la tuta loĝantaro, kvazaŭ per laboro germana. (Vidu aliloke la statistikon pri la aŭstria monarkio.) Tiukaŭze ni absolute ne volas perdiĝi sub la ĝenerala nomo de „aŭstriaj" Esperantistoj, precipe ne post la spertoj, kiujn ni jam travivis, sciante tre bone, ke per nia morala kaj financa subteno ni donus al niaj — cetere ĉiam kiel kunlaborantoj estimataj — germanaj samideanoj la okazon paroli en nia nomo pri niaj aferoj antaŭ la mondo kiel pri aferoj aŭstriaj. Danke (!) la nesufiĉan konon de la aŭstriaj kulturaj kaj politikaj cirkonstancoj inter fremduloj, aperus en tia okazo nia laboro kiel laboro de Germanoj kaj ni, kiuj povas esti

nun fieraj pri tio, ke la informado pri nia penado nacia kaj kultura pere de Esperanto bone progresas kaj atingas amikan komprenon en la cetera mondo, tiamaniere helpus mem kontraŭlabori la rezultatojn de niaj ĝisnunaj klopodoj. Ni estas certaj, ke ĉiu senpartiulo aprobos plene nian sintenadon. Al niaj aŭstriaj amikoj ni rekomendas relegi similan respondon de hungaraj Esperantistoj, rilate la saman aferon.

EL BATALEJO.

Originala letero de bulgara Esperantisto Konstantin Pečigargov, servanta ĉe la milita ambulanco.

Post la duonmiljara sklava, senluma vivado, sub la terura turka regado estis al nia nacio donita larĝa kampo de libera kultura vivo. Al mi ŝajnas, ke oni jam konfesas, ke ni, Bulgaroj, inde uzis la konfidon de la egoista Eŭropo, kiu sub nia administrado lasis malgrandan anguleton de Balkana duoninsulo. Kaj nia nacio, energia kaj plena de intensa vivemeco, en preskaŭ kvarono de centjaro ĝismarŝis tion, kion la aliaj faris dum nia kvincentjara dormo. En la relative tre mallonga periodo de libera, sendependa vivo, nia malgranda regno sufiĉe montris sian vivopovon: tuj post la liberigo okazis revolucio por feliĉa kunigo de la suda Bulgarujo kun la norda; post nelonge la tre bedaŭrinda serbo-bulgara batalo, kie ni gloris la unuajn venkojn; sekvis la detroniĝo de nia tiama princo Aleksandro Batemberg. — Kaj dum la sekvanta 25-jara paca regado de nia nuna saĝa reĝo Ferdinando ni montris al la mondo nian nacian genion kaj la rajton al la sinscia, libera vivo.

Ni ĝiskuris la kulturan Eŭropon! Ni havas jam preskaŭ tiom da legosciaj, kiom ekz. en via monarkio (93·2%, ĉe la soldatoj) Ni havas sufiĉe da relvojoj, ŝoseoj, florantan teksindustrion, kontentigan eksportan komercon, mirindan balancon en la buĝeto. Politike, interne kaj internacie ni estas benitaj. Nia konstitucio estas, kun siaj leĝoj, parlamentordo kaj metodo de elektoj (deputataj kaj komunumaj), pli libera, ol ĉiuj aliaj konstitucioj en la mondo, kaj nia ŝtata konstrukcio, kie ĉiu unuo estas respektata, similas je la franca respubliko. — Ni havas eminentajn scienculojn, politikistojn, armeanojn; ni havas ĉion, kion ni bezonas! Nia popolo estas riĉa —: en niaj vilaĝoj vi vidos komforton, limtuŝantan je pikanta gusto. — Ni estas konsciaj pri nia riĉeco, nia povo.

Kaj kiam antaŭ kelkaj jaroj ni proklamis nian sendependecon de la turka imperio kaj fidelaj al niaj naciaj tradicioj, ni nomis nian ĝistiaman „princon“ — reĝo (car), ni estis je la zenito de nia rapida progreso. — Kaj ni ne forgesis nian nacian idealon, kies realigo postulis grandegajn viktimojn: la liberigon de niaj trans-rhodopaj, tiom multe suferantaj sangfratoj, per unu terura, pereiganta batalo.

Batalo, kia terura prezo. Batalo...! Kiom da kortuŝantaj bildoj elvokas tiu sola vorto en la animo! Tiu vandala, barbara, senhomeca agado! Kiam bruego kaj skuado de kanonoj, pafilegoj kaj manpafiloj tondras, disŝiradas la aeron kaj tremigas la teron — tio ne estas sufiĉe forta por esprimi la sopiron de la popolo, la ĝemojn kaj plorojn de miloj kaj miloj da patrinoj, kies amataj filoj kuŝas ie sub la ĉielo, kaj la hundo dentŝiras iliajn ĝisnelonge ruĝajn kaj gajajn vizaĝojn, aŭ korvo bekpikas iliajn iam belajn, gajajn okulojn. — Vasta terpeco; estas ĝuste post la trairo de la venkanta armeo; la vunditoj estas forportitaj kaj la mortintoj enterigitaj. Dum la nokto falis maldika kovrilo da neĝo — ĉio estas blanka... Sed kio estas tiuj ĉi nigraj arbetoj, kiuj montriĝas je ĉiuj 10—15 paŝoj? Antaŭ ĉiu estas senpaco, nervoza grupeto da nigraj, malagrablaj birdoj... kaj la aliaj, sufiĉe grandaj, trankvile okupataj... Kio okazas? — La agloj malkovris la nesufiĉe profunden enterigitajn korpojn kaj nun ili kun la korvoj havas funebran manĝotablon: tie piedon, tie manon aŭ kapon! kaj kiom ili ŝatas la okulojn..! Kaj vi staras, rigardas... nek enuo, nek ĝeno... nek unu larmo; vi estas kiel ligna... nenia sento! Vi suprenigas la pafilon kaj celas la plej proksiman aglon — ĝi ĝuste okupiĝas, kiel atenta dentisto, en la buŝo de unu malfeliĉulo, kies senokuligita kapo rigardas de la tero la ĉielon. La bruo de la pafo neniun ĝenas, krom la trafita aglo, kiu per sia korpo kaŝas la teruran kapon... kaj vi daŭrigas vin amuzi. Jes, amuzi..!

Miaj amuzoj dum la lastaj du semajnoj! Ĉu mi rakontu? Ne, mi ne devas esti tiel kruela, ĉar vi pro timo ne dormus preskaŭ sep tagojn! Kiam ni revidiĝos, mi rakontos, multe, longe, interese — antaŭ la teo. Sed ĉu ankaŭ tiel trankvile, kiel nun mi skribas? Mi dubas!

Mi havas multe, tre multe por rakonti. Sed nun mi tion ne povas kaj ne volas fari; eble mi vin enuigas. Sed vi diris (en via letero), ke vi admiras niajn venkojn. Certe ili estas admirindaj! Tamen ne la fakto mem, sed estas admirindaj la kaŭzoj, kiuj ĝin ebligis. Ĉu vi scias, kial ni, Bulgaroj, triumfas tiom da gloraj venkoj? ke la Turko ne estas plu fanatika? ke li fariĝis malpli kuraĝa ol iam? ke li elportas pli malfacile ol ni la suferojn kaj la mankojn? Ĉu vi scias, ke la turka armeo estas multe pli bone armita ol ni? — Ĉar la Germanoj, volante havi certan (!) fortan manon sur la Balkanoj, nenion ŝparis por vesti la nudajn aziajn amasojn, donis al ili *perfektajn pafilojn kaj karajn* pafilegojn; la militmaterialo ne estis ŝparata; eĉ multaj el germanoj oficiroj estas en servo de Turkoj. — Sed ĉiuj penoj de la slava malamiko estis vanaj! — La mondo devas evolucii! Kaj la fatala horo de la elbordiĝo sur Balkanoj terure sonas.

Ĉiu devas preni la sian: la azia barbaro sian azian dezerton, kaj la progresemaj, kulturemaj kaj kulturindaj balkanaj popoloj — siajn riĉajn, belajn valojn kaj pentrindajn montojn kaj bordojn balkanajn.

La unua — meritas morti! La aliaj feliĉe ekvivi per la inda por ili kulturo, iri la vojon de la progreso per paca evolucio.

Kial ni venkis ĉe Lozengrad, Ĉorlu, Lüle-Burgas, Burnahysar?

Ĉar ni ne batalis por mortigi, sed por revigi! — Mi vidis Turkon, kiu apenaŭ vivis kun sia unu piedo — la alia estis forigita de granato; al li venis bulgara saneca korpusano lin helpi; kaj kiam la bona homo ekzamenis la vunditon, li ricevis anstataŭ danko glavon en la stomakon. La Bulgaroj flegas ĉiujn vunditajn Turkojn, eĉ tiujn, kiuj per sia sintenado meritas punon. Sed Turko, tio estas bestaĉo. Vi ne povas prezenti al vi, kiel oni traktas la Bulgarojn — ĉu vunditajn ĉu sanajn — kiuj okaze falis en iliajn senhomecajn manojn. Pri tio mi ne parolos — terura, naŭzega..! Per tia taktiko oni neniam venkas — tio elvokas ĉe la kontraŭulo nur pli grandan persitecon kaj deziron sin venĝi.

Ĉar ni ne batalas per la forto, sed per la kulturo, per la inteligenteco, per la saĝeco. — Kio okazis kun la karaj senfadenaj telegrafinstalajoj ĉe la Turkoj? Oni devis havi germanajn oficirojn — inĝenierojn por ilin funkciigi; sed ilia sangosoifa soldato ilin nur difektis. Kial per siaj bonaj pafiloj ili ne povas trafi? Ĉu vi scias, ke oni trovis bulgaran granaton falintan ĝuste en la buŝon de unu turka pafilego? — Ĉiuokaze, tio estas nur hazardo, sed multeparolanta!

Ĉar ni ne estas famatikuloj, sed entuziasmuloj; ni ne estas fatalistoj, sed ni matematike solvas niajn venkojn kaj bezonojn. — La Turko kredas, ke ju pli multe da nekreduloj (ĝaŭroj) li mortigos, des pli proksime al la eterna feliĉo li estas. Sed aliflanke ili scias, ke kiam 7 reĝoj kuniĝos kontraŭ ilia monarkio, tio estos ĝia fino — tion ili nun supozas kaj timas, kiel ĉiu fanatikulo la antaŭdiritan morton. La Bulgaroj nur scias, ke ili devas ŝpari siajn vivojn, ke ili batalas por la libereco kaj en la nomo de la homeco.

Kaj ĉar, fine, al la Turko oni ordonis batali. Sed ni, la Bulgaroj, kvankam ni ne volis batalon, kiam ĝi estis neevitebla, deviga, ni iris en la fajron memvole, kuraĝe, kontente kaj kantante — ĉar ni sciis kial.

Ne estas mirindaj niaj gloraj venkoj en la batalo; ili estis certaj! Ĉar ni havis unu pli grandan venkon: en nia ŝtato ni venkoatingis la kulturon, la inteligentecon. Kaj la ŝtato, kiun ni nunvenkas, kaj kiu ne ekzistos plu, estis jam pli frue detruita, ruinigita. — Victor Hugo en Ruy Blas diras: „Kiam iu monarkio estas

detruota, multaj fenomenoj tion antaŭdiras. Unue oni vidas la aristokration disfali. Malprogresante, ĝi ruiniĝas, kaj jene: la reĝa trono kliniĝas, la korteganaro senmoriĝas, la leĝaro falas, la politikan unuecon disrompas la intrigoj . . ." Laŭ tiu antaŭdiro de la franca eminentulo oni povis certe antaŭdiri la finon de la „mal sanulo".

Niajn venkojn oni admiras, nur kiam oni ne konas nin, nek la venkaton. Admiros tiuj, kiuj ne vidis nin laborantajn . . . En la 45.000-kapa turka garnizono ĉe Lozengrad oni trovis eĉ ne unu ŝoferon por aŭtomobilo de la princo. Sed en la bulgara armeo ni havas trifoje pli multe da ŝoferoj, ol ni bezonas por niaj 980 aŭtomobiloj. En la lokoj, kie la turka garnizono mortadis de malsato, oni poste trovis grandegajn amasojn da manĝoproduktoj. La Turkoj ne povis ilin disdoni! . . . Antaŭ vi paŝas senfinaj vicoj da soldatoj — horon, du horojn; ilin sekvas centoj da pafilegoj, trenataj de miloj da fortaj ĉevaloj — la artilerio; nun la rapidaj bulgaraj pioniroj, kiuj portas kun si la tutan komplekson da telegrafa instalaĵo je 100—150 km.; kaj jen, la vere sennombra karavano brue marŝas horojn, tagojn; la nigraj bubaloj trenas kviete pezegajn veturilojn, kiuj ruliĝas unu post la alia, unu post la alia . . . senfine. Kaj ĉiu estas sur sia loko, ĉiu iras laŭ la leĝa ordo — nek unu manko, nek la plej malgranda senordo. Kaj tiuj dekmiloj da buŝoj, venintaj en la tendaron, en unu horo ĉiuj ricevos sian manĝaĵon kaj ripozos. — Poste ili daŭrigas, kaj venkas, venkadas! Kial ne? Ĉie la ordo venkas la senordon, la disciplino la maldisciplinon, la kuraĝo la timon, la saĝo la malpripensemecon.

Jes, ni, kiuj havas la rajton vivi — vivos. La mortanta — morgaŭ estos mortulo. Ni lin enterigos! Jes, ni, Slavoj!

Tiam la suno suriros la ĉielon kaj la grandega slava familio floros, kreskos, donos ankaŭ sian ŝuldon al la makrokosmo. Tiel postulas la naturo mem — kaj tial tio certe estos. Ne timu kion ajn! Ni venkos, kaj nia estos la estonteco,

Jes, nia — de la Slavoj! — Laŭ la ŝrauba vojo la mondo progresas certe kaj senlace. Nun ĝi iras je unu grado supren, kaj tiu apartenas al ni. Jes, al ni — Slavoj! Estu benita ilia rolo por la bono de la homaro!

La teruraj sekvoj de la batalo, kaŭzita pro netaŭgeco de la tiel nomata diplomatio eŭropa, premege persekutos la balkanajn naciojn. Ne restu neaŭdataj iliaj petoj pri helpo. Ĝoje ni notas, ke inter la fratoj bohemaj miloj da koroj helpis laŭpove: La kolektita sumo de preskaŭ unu miliono da kronoj kaj la donacita materialo por la hospitaloj, en kiuj sindone laboras 150 bohemaj kuracistoj kaj multe da flegistinoj, pruvu niajn simpatiojn.

(Al Danilovgrad ni sendis donacojn de: s-ino A. Kočvarová 1 K, Nenomita 15 K, s-o Chaloupka 1 K).

Z CELÉHO SVĚTA.

O významu Esperanta pro sběratele. Příštího roku uspořádá francouzský spolek filatelistů mezinárodní výstavu v Paříži pod protektorátem ministra kolonií, kterou obešlou i cizí spolky sběratelské. Vážní spolupracovníci a sestavení výboru zaručují podniku již nyní nejlepší úspěch. Časopis „**Tra la filatelio**“ chce při této příležitosti upozorniti návštěvníky výstavy na nejjednodušší prostředek k získání přímých styků s celým světem — na Esperanto a připravuje zároveň schůzku Esperantistů-filatelistů. Mezi jiným píše: „Mnozí z filatelistů jsou Esperantisty a můžeme to, pokud se nás týče, snadno dokázati. Když jsme před několika lety přijali do svých sloupců Esperanto, nikdy jsme nepředpokládali, že by Esperanto za krátký čas, ačkoliv jsme mu poskytli pouze několik rubrik, téměř zcela náš list zabralo. A přece se tak stalo. Dostáváme dnes ze všech čtyř úhlů světa více dopisů esperantských než francouzských nebo v jiných jazycích. Tato změna způsobila nám ztrátu mnoha francouzských předplatitelů, ale cizí esperantští předplatitelé mnohonásobně nahradili nám ztracené a náš časopis vskutku mezinárodní tím získal zvláštní kruhy odběratelů skutečně věrných, jakých až dosud nedosáhl žádný z ostatních orgánů filatelistických. A tento makavý důkaz jest zřejmým dokladem přednosti Esperanta a užitečnosti jeho služeb pro sběratele. Na druhé straně všichni Esperantisté jsou sběrateli, i kdyby sbírali jen pohlednice ze všech zemí frankované cizími známkami, již tím se stanou mimovolně sběrateli známek a jakmile poznají, že jejich sbírka stává se jakýmsi kapitálem zpeněžitelným podle přání, stávají se sami, dík Esperantu, filatelisty. Lze tudíž z toho dovoditi, že Esperanto jest pro sběratele pomůckou nevyhnutelnou. Náš přítel pan Lemaire, autor filatelistického esper. slovníku poukázal na to již před několika lety“. V Esperantu jsou vydávány časopisy sběratelské: „*Tra la filatelio*“ měsíčník franc.-esp. pro filatelisty a sběratele pohlednic. Paris 2-e. Rue d'Argout 53. Předplatné ročně 2 K (premie). — „*Monda poŝto*“, měs. orgán sběratelů známek, pohlednic, knih, časopisů, mincí, maleb atd. (něm., franc., angl., esper.) Adr. J. Thalmann, Fischenthal (Zürich). Předpl. K 2·50, (se členstvím K 3·75). — Adresy svazů sběratelů známek: „*Internacia Filatelia Esperantista Unuiĝo*“ (sekr. S-o Carlos, Paris 71. rue St. Martin). — „*Internacia Ligo*“ (adr. jako „Monda poŝto“). Zástupci svazů ve všech zemích. — Odbor „*Interŝanĝa fako*“, založený při U. E. A. v Ženevě, jehož členy mohou se státi za zvláštní roční přísp. K 1·20 členové U. E. A. (kteří platí ročně K 2·40), vydává čtvrtletní seznam přihlášených s poznámkami, o čem přejí si dopisovati. Jednací řečí Esperanto. (Přihlášky v Praze II., Vodičkova ul. 38. Delegát U. E. A.).

Universala Esperanto-Asocio zve spolky esperantské, aby se přihlásily za členy jakožto „podniky esperantské“ (esperantiaj entreprenoj) s ročním příspěvkem 3 Sm (K 7·20), za který dostávají do listopadu 1913 čtrnáctidenník „Esperanto“, legitimaci U. E. A. s ročenkou, obsahující seznam delegátů a mají právo býti zapsány v této ročence.

Kladno. Kursoj: vendrede 8—9, dimanĉe 2—4. Sume 26 gelernantoj. Estas preparata propaganda leciono, kiun ĉeestos la klubanoj el Slaný. — En **Plzeň** aranĝas la kluboj la 14. XII. jubilean feston je honoro de 25-jara ekzistado de Esperanto. — En

Přelouč kaj en **Holice** fondiĝas klubo. — Kursoj esperantaj estas malfermitaj en la reala lernejo en **Olomouc** (instruas s-o Rud. Petr 15 lernantojn). — En **Pardubice** gvidas kurson por 37 komencantoj kaj por 16 progresintoj s-o dr. Schulhof. Kurson por laboristoj gvidas s-o Chmelař.

Paroladvojaĝo de s-o prof. Pitlík pri Praha kaj pri la bohema nacio, pri kiu ni parolis jam en la lasta n-o, komenciĝos la 16. de decembro en Praha per bohema parolado en la lernejo en Vladislavova ul. (½8 vespere); ĉi tiu celos elmontri al nia publiko la temon kaj bildojn, kiuj servos al informado de fremdlando pri nia metropolo kaj nacio. Pluaj paroladoj, ĝis nun fiksitaj, okazos en Braunschweig (18. XII.), en Antwerpen (20. XII.), en Lille (22. XII.). Dum januaro estos vizitita Britujo, kie la propagandon kaj ĝeneralan aranĝon de la turneo prenis sur sin la Brita Asocio Esperantista. En februaro: Belgujo, Francujo, Hispanujo; en marto: Italujo, Svisujo, Germanujo; en aprilo: Danujo, Svedujo, Norvegujo, Rusujo; en majo: Hungarujo, Balkanlandoj. — S-o prof. Pitlík detale raportados al nia legantaro pri siaj aventuroj kaj pri la progresado de sia entrepreno.

B. U. E. sendis laŭ deziro de s-o dr. Sum, urba pres. sekr. en Praha, al **s-o Hill** esperantan tradukon de kelkaj **ideoj de Palacký**, kiujn antaŭ la jus inaŭgurita monumento citis en sia parolado dr. Kramář. S-o Hill, tradukinte la tekston en la anglan lingvon, sendis ĝin al s-o dr. Sum, por pruvi al li la ĉiuflankan perfektecon de Esperanto. (S-o Hill ĉeestis la inaŭguron en Praha kiel gasto.) Dr. Sum, traleginte la anglan tekston, skribas: „Mi uzas la unuan okazon por esprimi miajn plej korajn dankojn al Vi por viaj leteroj kaj por la bonega traduko de la parolado de dr. Kramář pri Palacký. Mia unua impreso, kiam mi legis tiun ĉi tradukon en London (ĉe la oficiala vizito. — Rimarko de la red.) estas nun konfirmita, kiam plej zorge mi ĝin komparis al la originala teksto kaj mi preskaŭ ne povus kredi, ke tia afero estas ebla, se mi ne bone trovus, ke tio estas fakto. Vere mi miras, ĉu eĉ direkta traduko (el la bohema lingvo en la anglan) povas esti pli preciza. Mi atentiĝos nian anglan rondon pri via traduko kaj laŭ via inspiro mi bone uzos ĝin dum la venonta aŭtuna sezono. Mi jam montris ĝin al kelkaj el miaj amikoj, kiuj preskaŭ ne volis kredi, ke vi tute ne parolas nian lingvon. Esperanto estas bonega afero! Se mi havos okazon, mi montros vian tradukon al dr. Kramář post lia reveno al Praha kaj ankaŭ vian leteron komentantan lian paroladon".

•

Nekrologo. Kun profunda kordoloro ni sciigas al la samideanoj, ke la 20. de novembro mortis post mallonga malsano nia tre estimata membro kaj favoranto, sinjoro František Davídek, posedinto de la kafejo „Union" en Praha. Lia nomo estis certe bone konata de la Esperantistoj bohemaj, kiuj trovis lin ĉiam en sia esperantista kunvenejo, gajan, interesiĝantan pri nia movado. Lia favorado de Esperanto, kiun li ankaŭ studis malgraŭ sia multflanka okupiĝo, ne limiĝis sole je intereso aŭdi novajojn pri la progresoj, sed li mem multe helpadis niajn laborojn, disponiginte al ni specialan ĉambron en la kafejo por la preparoj antaŭkongresaj kaj sincere li ĝojis kun ni, kiam novaj venkoj estis akiritaj. Nia gazeto trovis en li jam antaŭ ses jaroj ŝatindan, neforgesotan amikon, kiu valore kunhelpis nin en nia entrepreno kaj kiu tiel

havigis al si nian amon kaj estimon plenmeritan. Lia nomo, intime ligata kun la historio de nia afero en Praha, restos enskribita per oraj literoj en nia koro. En nomo de ĉiuj samideanoj ni petas lian estimatan familion, ke ĝi akceptu nian profundan kondolencon.

IOM DA INSTRUO.

(*Překlad českého textu z čísla* 8.)

FALĈILO KONTRAŬ ŜTONO. Dum la olimpiaj ludoj en Stockholm venis iu sinjoro en restoracion, demetis la superveston, starigis li pluvombrelon apud la pendhokaro kaj fiksis sur ĝin folieton kun la sekvanta noto: Tiu, al kiu ĝi apartenas, estas monda ĉampiono de bokso kaj li revenos tuj. Post kiam li estis vespermanĝinta kaj volis foriri, estis la pluvombrelo for kaj sur ĝia loko estis fiksita la supreпomita bileto kun sekvanta noto dorsflanke: Tiu, kiu nun havas la pluvombrelon, estas maratona kuristo kaj revenos neniam plu.

VIII. KONGRES ESPERANTISTŮ V KRAKOVĚ.

(*Dokončení.*)

V neděli večer, dne 11. srpna, konal se na Střelnici raut při koncertu hudby pěš. pluku č. 100, která zahrála též esperantskou hymnu. Tento večer byl vhodnou příležitostí, aby účastníci sjezdu navzájem se seznámili.

Druhého dne byly časně ráno zahájeny schůze v jednotlivých sekcích: členů Lingva Komitato, Červeného Kříže, Svazu katolíků, volných myslitelů, železničních úředníků, žurnalistů, lékařů, farmaceutů, učitelů, právníků, úředníků, obchodníků, theosofů, esp. spisovatelů, přátel věd technických, příslušníků malých národů, Esperantistů slovanských atd. Během sjezdu konána též valná hromada světového Svazu Esperantistů U. E. A., jehož účelem jest, jak známo, pouze prakticky používati znalosti Esperanta ve stycích mezinárodních. Na oslavu Zamenhofovu uspořádána jubilejní slavnost, na níž účinkovaly nejpřednější síly krakovského světa divadelního. — V úterý dopoledne byla podniknuta prohlídka města s výkladem v Esperantu podávaným krakovskými studenty a odpoledne výlet zvláštním vlakem do solných dolů ve Věličce, kde kongresisté byli uvítáni starostou města Aywasem. — Ve středu navštívena výstava architektury a polského umění, vědecké sbírky vysokých škol a vojenská jezdecká škola, kam kongresisté byli pozváni sborovým velitelstvím. Večer sehráno při vyprodaném domě Słowackiho drama „Mazepa“, přeložené do Esperanta A. Grabowskim. Všichni účinkující (členové Nového divadla), dokonale ovládajíce Esperanto, podali výkon, který kritikou co nejpříznivěji byl oceněn, a dík jejich umění, znovu byl tak podán

důkaz o ohebnosti a libozvučnosti Esperanta. — V následujících dnech, mimo schůzí odborných, účastnili se kongresisté četných přednášek, z nichž jmenujeme: „O Kalifornii“ (promluvil D. Parrish, který na své propagační cestě Evropou již ve 250 městech esperantsky přednášel), pokusy s tekutým vzduchem (Dr. Bujvid), „O Kavkaze“ (Dr. Fišer), „Tělocvik a athletika“ (Dr. R. de San Millan) „Z historie zubní techniky“ (Dr. E. Sós). — Znovu shromáždili se kongresisté v Novém divadle v pátek večer na představení opery „Halka“, která v esperantském rouše opět těšila se všeobecnému zájmu. — Nejčetněji byl navštíven ples, jehož súčastnila se velká část kongresistů v národních krojích. Pestrý obraz tanečního reje byl se zájmem pozorován pozvanými hosty z přední společnosti krakovské, kteří obsadili do posledního místa galerie sálu Starého divadla.

Po dobu trvání kongresu byla otevřena v místnostech obchodní akademie esperantská výstava a prodejna uměleckých výrobků lidových. Ve svátek P. Marie konány bohoslužby s esperantským kázáním v kostele katolickém (P. Marie), protestantském a v židovské synagoze.

Schůzka slovanských Esperantistů byla navštívena asi 50 kongresisty. Ing. Andonovič, docent bělehradské university, redaktor Krestanov ze Sofie, prof. krakovské university Odo Bujvid, red. dr. Mikolajski ze Lvova a řada řečníků ze šesti zastoupených národů slovanských jednohlasně vyslovili své mínění o nutnosti zaváděti Esperanto jakožto jedinou praktickou řeč pomocnou do styků mezislovanských a o potřebě ustaviti „Mezislovanský esperantský výbor“, do něhož zvoleno po dvou zástupcích z jednotlivých národů. Za Čechy: Školní rada dr. V. Rosický v Praze II., Táborská 48 a řid. škol Stan. Otruba v Těšeticích na Moravě. Za Bulhary: Ivan K. Krestanov, stud. filologie v Sofii a Kr. Mirski, advokát ve Varně. Za Poláky: Prof. Odo Bujwid v Krakově a Ing. Antoni Grabowski ve Varšavě. Za Rusy: A. Sacharov, řed. moskevského Esper. ústavu a dr. Kabanov v Moskvě. Za Ukrajince: Anatol Koch stud. veter. školy ve Varšavě a Lev Denysiuk, pošt. úředník v Novoselu. Za Srby: Ing. Dragomir M. Andonovič univ. docent v Bělehradě a Pavel Stanišič, advokát ve Vinkovci v Chorvatsku. — Prof. Bujwid zvolen předsedou; týž sám ustaví výbor. Byly již několika účastníky vysloveny naděje, že lze doufati k založení slovanské revue esperantské, která by se stala vskutku neutrálním pojítkem všech Slovanů.

Valná hromada **Svazu přátel esperantské literatury**, jehož orgánem jest též „Oficiala Gazeto“ schválila zprávy o prvním roce činnosti výboru. Hlavní práce členstva i výboru bylo pročítání a opravování zasílaných rukopisů. (Kniha M. Posenaerové „Rikke-Fikke-Fak“, přeložená z flanderského originálu H. Conscience, byla právě vydána s doporučením svazu.) Dvěma schůzím v Krakově pořádaným předsedala pí. prof. Hankelová. Mezi návrhy přijato též změniti název Svazu — dosud „Internacia Unuiĝo de Esperantaj Verkistoj“, který nyní bude zníti: Esperantista Literatura Asocio (E. L. A.).

Schůze spolku právníků „**Societo de Esperantistaj juristoj**“ zvolila předsedou de Wierzchowskiho, jednatelem S. Dogona (Douai, 17, rue St.-Eloi, France). Roční čl. přísp. K 2·40. Orgánem spolku jest „La Revuo“, v němž nyní vychází v esp. překladu D. Euquema obsah měsíčníku „La Vie internationale“ (Internacia vivo), vydávaný „Ústřední kanceláří mezinárodních svazů“ v Brusselu. Vedle článků všeobecného významu uvádí č. 74. „Revuo“ na osmdesát kongresů, které jsou stanoveny na rok 1913 od března do září a upozorňuje na tuto vhodnou příležitost, kdy mohou naši přátelé s úspěchem doporučiti svým odborným sjezdům Esperanto.

Lingva Komitato sestává nyní ze 145 členů: 27 za jazyk anglický, 4 za český, 1 za dánský, 2 za finský, 3 za vlámský, 41 za francouzský, 16 za německý, 11 za španělský, 3 za hollandský, 4 za uherský, 1 za islandský, 6 za italský, 3 za katalánský, 6 za polský, 6 za portugalský, 1 za rumunský, 8 za ruský a 2 za švédský. Od letošního roku budou členové voleni vždy na 9 let a navrhovati nové kandidáty budou moci nejen členové L. K. ale i esperantské korporace.

Universala Esperanto Asocio uspořádala v Krakově svůj třetí kongres, na němž jakožto na valné hromadě předneseny a schváleny ve 4 schůzích zprávy funkcionářů. Účastníkům rozdána sbírka 12 referátů a návrhů, z nichž mnohé byly přijaty; bylo usnešeno zvýšiti členský příspěvek z K 1·25 na K 2·45 a založiti garanční fond 24.000 K. Písemným hlasováním delegátů bylo toto usnešení nyní přijato: z 1100 hlasovalo 59 delegátů, kteří odevzdali 69 hlasů pro, 14 proti. Příspěvky pro odbory pro výměnu, dělnický, ženský a nově založený studentský zůstaly nezměněny (K 1·20) Členům o d b o r ů jest zasílán odborný věstník zdarma. Na schůzích byla projednána též organisace hotelové služby směřující k tomu, aby byl usnadněn cestujícím Esperantistům pobyt a návštěva cizích měst. Bližší zprávy o U. E. A. zašle na požádání a č l e n s k é p ř i h l á š k y p ř i j í m á delegát Ed. Kühnl v Praze-II., Dittrichova ul. 7.

BIBLIOGRAFIO.

Ĉe „*Ader & Borel*“ *Dresden A 1.*: Dr. Breiger: La artefarita „*Altmonlarum*“-*bano* nova kuracmetodo (18 pĝ. broŝureto pri lumterapio). — Esp. Biblioteko internacia: N-o 23. J. B e n a v e n t e; *Hispanaj dramoj*; trad. V. Inglada (37 pĝ.). N-o 24. J e a n J u l l i e n: *La Instituto Milner*; trad. „La Lyon'a grupo“. Prezo po 24 h. Ambaŭ verketoj pruvas, ke la ŝatata biblioteko konservas sian difinitan celon: prezenti nekaran kaj bonan legaĵon al nia mondo esperantista.

Ĉe „*Universala Esperanto Librejo*“ *Genève* 10. r. de la Bourse: H. C. M e e s: *La kaŭzo de senlaboreco* (58 pĝ. mondformato). Prezo afr. 72 h. Studverko tradukita de la aŭtoro el la holanda originala manuskripto. — E s p e r a n t i a B i b l i o t e k o: Oficiala dokumentaro de la *tria kongreso de U. E. A.* en Kraków 1912 (112 pĝ. mondform.). Prezo K 2·40. Raportoj de la komitatanoj, proponoj, protokolaro de la kunvenoj, listo de kongresanoj. — Ĉe „*Germana Esperanto-Librejo*“ en Leipzig: R. R i c h t e r: *Esperanto-Gvidanto pri la publika interkomunikiĝado.* Prezo K 1·20. Esperanta demandaro kun respondekzemploj. Rekomendinda libro! (La ofta uzado de

„do“ ne estu imitata; male oni memoru, ke „do“ en Esperanto ne identiĝas kun „do“ germana. La germana „doch“ estu tradukata plej ofte: „ja“, „tamen“.) — Internacia Librotrezoro: N-o 1. P. Kress: *Rozo sovaĝa aŭ pentita kulpo. Novelo. Versaĵoj* (24 h). N-oj 2—4. M. Hankel: *Ŝableroj* (72 h). N-oj 5—6. Molière: *La malsanulo pro imago*. Komedio en tri aktoj. Trad. Rektoro v. Welten (48 h; 10 × 14). Bonstilaj libretoj tre bele presitaj. — K. Speus: *Poŝtmarklingvo Esperanto* laŭ bonekonata sistemo (48 pĝ. veŝtpoŝa formato; 24 hal.). Korektinda: Ĉu vi revas *de* mi? (*pri*!); veni ĉe vi (*al*!).

Diversaj eldonejoj: G. Warnier & Co. Paris: E. Ĉefeĉ: *La Elementoj kaj la vortfarado*, gramatiko kaj sintakso en Esperanto kun notoj pri la novlatinigo „Ido“ (64 pĝ. 12×18, K 1·80). La sama: *Pluaj argumentoj* por pruvi, ke la teorio: „La radikoj en Esperanto havas gramatikan karakteron“ kontraŭstaras la intencojn de la Fundamento (11 pĝ.). — Hall-Baroll: *Rakonto kaj aventuro* (31 pĝ.). Eld. American Esp. Company en Washington. — O' Connor-C. F. Hayes: *Konkordanco al la krestomatio*. (N-o 4. de la „Verd-Stelo“ serio.) (21 pĝ. 80 hal.) Eld. Pionira Librejo Esp. en London SW. Kompilaĵo tre valora por tiu, kiu volas fundodetale studi certan parton el la literaturo de Zamenhof. Tiu ĉi broŝureto traktas pri la participoj, citante per ciferoj la paĝojn kaj liniojn. — Sebastian Faure: *La krimoj de Dio*; trad. Luis Carlos kaj F. Buokin (32 pĝ. 25 hel.). El kolekto „Paco-Libereco“, Paris 3e, 49. rue de Bretagne. (. . . turmentita pro ne esti salutinta?? nekomprenebla por nefrancaj samideanoj; esperánte oni diras: ĉar li ne estis salutinta!!) — A. Ĉechov: *Du rakontoj*; trad. B. Kotzin (30 pĝ. 24 h). „Rusa Biblioteko“ n-o 2. Eld. Moska librejo „Esperanto“. — Biblioteko de „La Verda Standardo“-Budapest. N-o 5. *Elektitaj poemoj de A. Petőfi*. Trad. Dr. E. Fuchs (54 pĝ. 80 hel.). — N-o 9. A. Marich: *Skizoj el mia propagandista vivo* (37 pĝ. 36 hel.). — J. van Wonde: *Ne dezirita. Ni virinoj*. Trad. M. Posenaer (31 pĝ. 60 hel.) — A. J. Adams: *Esperanto inter la blinduloj*. El „La Revuo“ 1912. (16 pĝ.) Ĉe la aŭtoro en Hastings, Plynlimmon Terrace, Anglujo. — Ig. Teichfeld: *Bonan apetiton!* Manĝokarto en la lingvoj: Esperanto, angla, franca, germana, pola, rusa. (Folio, 25 hel.) Ĉe aŭtoro en Warszawa, 89. str. Jerozolimska. — A. Tellini: Esperanta Abelo. N-o 18. *Fabloj de Lokman la Saĝa* (30 pĝ.). N-o 19. Joh. Bovio: *Kristo ĉe la festo de Purim*. Unuakta dramo (41 pĝ.). N-o 20. *Kompararo laŭ itala lingvo* (16 pĝ.). N-o 21. Edm. de Amicis: *La urbo, kiu dormas. La urbo de l' revoj* (44 pĝ.; 48 hel.). Postulu ĉe la aŭtoro (Bologna, Esperanto-Oficejo, Velescura) nomaron de liaj ĝis nun aperintaj verkoj. — Arnold Behrendt: *El la domo tie kontraŭa*. Skizo laŭ la vivo (14 pĝ.; 25 hel.). Ĉe la eld. en Breslau 16. Maxstr. 22. — Jan Günther: *Albumo de Kraków*, urbo de la jubilea kongreso. — J. Hechtl: *Franzensbad* (Bohemujo). La plej fama banurbo de la mondo rilate al la torfaĵaj banoj. La plej efika kuraca loko por kormalsanuloj. Ilustrita, senpaga broŝuro 16 pĝ, havebla ĉe la baneja administracio. — *Los Angeles, Kalifornio*. La urbo kaj la graflando. Unua esperanta eldono. 1912 (63 pĝ.; 14×22). Tre riĉe ilustrita informilo, kiun senpage sendas la Komerca Ĉambro. — Dr. A. Rudy: *Vendo vendita*. Humora bilda rakonteto 16 pĝ. Prezo 60 hel. (Ĉe la aŭtoro en Raleigh. U. C. Usono.) — Prof. Odo Bujwid: *Kvin prelegoj pri bakterioj*. Skizo

pri ĝeneralaj principoj de bakteriologio en apliko al infektaj malsanoj kun aldono de rimarkoj pri serumoj kuracaj, inokuloj profilaktikaj kaj desinfektado. Trad. Emil Pfeffer. Eld. Gebethner & Cie en Kraków (48 pĝ., 17×25). Prezo K 1·20. — Saksa Esperantista Instituto: *Meissena Porcelano.* Laŭ la festverko de la jubileo 1910 (24 pĝ. 16×25). Ilustrita. Ĉe s-o Dr. Schramm en Dresden, Ständehaus; prezo: 1 respondkupono.

Novaj lernolibroj germanaj: Joh. Schröder: *Methodisches Lehrbuch der Internationalen Sprache Esperanto* II. Auflage. Eld.: A. Hartleben's Verlag „Bibliothek der Sprachenkunde" (177 pĝ. poŝformato). Lernolibro kun ambaŭ vortaroj. — Dr. A. Möbusz: *Lehrbuch der internationalen Hilfssprache Esperanto.* Kurzer und leichfasslicher Lehrgang zum Selbstunterricht (58 pĝ. 15×21). Eld. Gebr. Borchers, Lübeck. — J. Glück und Dr. Edm. Sós: *Vollständiger Lehrgang der internationalen Hilfssprache Esperanto.* Zum Selbstunterricht vorzüglich geeignet. II. Auflage (100 pĝ. 15×21; K 1·50). Eld. Paul Knepler, Wien I. Hoher Markt.

Muzikverkoj:

La Espero. Himno Esperantista; poezio de L. L. Zamenhof, muziko de F. de Ménil. Kvin diversaj eldonoj: por baritono aŭ mezo-soprano 50 hel., por ĥoro kun akompano de fortepiano 1 K, por ĥoro virvoĉa sen akompano 75 h., por ĥoristoj ĉiu partio kanta aparte 25 h., por fortepiano sola 50 h. Eld. A. Fjodorov en Moskva, str. Nikitskaja. (Postulu la katalogon de esperantaj muzikaĵoj.) — *Dancaro: koraj sonoj.* Mazurko de G. Atanasov (por piano) K 1·75. Eld. Alb. Besnard, Paris, 26, rue Antoinette. — Ĉe la sama: *Elektita kantaro* (kun fortepiano): 1. *La barketo,* Barkarolo de A. Besnard K 1·50; 2. *Nokto,* Valso de J. Rosas K 1·50; 3. *Kanto de l' printempo* de F. Mendelsohn, poezia almeto de H. Kruper K 1·25; 4. *Revenu!* Valso aranĝita de A. Besnard K 1·50; 5. *Antaŭen!* Wanderlied n-o 2. de Ad. Ŝefer K 0·75; 6. *Ĉi diru jes!* Melodio de L. Giannini K 1·50. (Petu ĉe la eldonejo plenan katalogon!) — *Mi aŭdas vin* (C' est votre voix). Poezio de Leono Zamenhof, Muziko de F. de Ménil. Prezo 1 K. Eld. Hachette & Cie. Paris, 79. bd. st. Germain. — Ĉe la sama: *La kanto de l' Cigno* (Le chante du cygne). Traduko de S. Sviridov, muziko de F. de Ménil. Prezo 1 K. *Ho, mia kor'!* Kanto Esperantista. Poezio de Dr. L. L. Zamenhof, muziko de Josée Guivy. Prezo 1 K. Eld. Presa Esp. Societo, Paris 33. rue Lacépède. — Ĉe la sama: *Himno.* Kanto esperantista. Poezio de Dombrowski, muziko de Josée Guivy. Prezo K 1·25. — *Birdoj forflugu!* Valso. El Guido Gezelle, trad. Seynaeve, muziko de Josée Guivy. Prezo K 1·60. — *La du muloj* (el Lafontaine). Fablo. Trad. Vaillant. Muziko de Josée Guivy. Prezo K 1·60. — *Himno Espero,* melodio por soprano aŭ tenoro. Poezio de Dr. L. L. Zamenhof, muziko de H. de Coppet. Prezo K 1·50. — *Kristnasko.* Poezio de Th. Gautier trad. de Dr. Philippet. Muziko de L. Rigoir. Prezo K 1·50. — *La himno esperantista* de l' Majstro Dr. L. L. Zamenhof. Kantigis Wolfg. Schaumburg. Prezo K 2·40. Eld. la Schaumburg-Fleischer's Verlag, Leipzig. — *L' Espero,* himno esperantista dediĉita al U. E. A. okaze je ĝia I. Kongreso en Augsburg. Paroloj de L. L. Zamenhof, muziko de „Samideanino". Prezo K 1·20. — *La tagiĝo,* kanto esperantista. Orig. verkita de Antoni Grabowski. Muziko de Barański. Prezo 24 h. Ĉe adm. de „Pola Esperantisto" Varszawa, ul. Hoża 20. — *Patro nia.* (Esperantaj vortoj de Dr. L. L. Zamenhof.) Religia kanto kun akompano de fortepiano (harmo-

niumo aŭ orĝeno). Muziko de Manilius Herbig. Prezo K 1·80. Eld. „Germana Esperanto-Librejo", Leipzig. — ***Valso Esperanto*** de Mad. René de Saussure. Prezo K 2·50. — ***Esperanto.*** Danckanto (polko) por fortepiano. Komponita de s-ino M. A. Vivoski de Jaŝi, Rumanujo. — ***Balado pri melkistino*** (dueto), angla popolkanto de Montagu C. Butler. II. eld. Prezo 30 h. Ĉe British Esp. Asocio en London W. C. — Ĉe la sama: ***Nova kanto,*** muziko de A. Trickett. Prezo 30 h. — Muziko kaj vortoj (esperante kaj angle) de la ***fama humora kanto Esperanto*** „La prezo unu penco, vi ĝin lernos en semajn!" Verkita, komponita kaj kantita de Harrison Hill. Prezo 10 h. ***La Espero*** (L. Zamenhof). Esperanta himno de Woldemar Zaks, op. 28. Eldono por unu alta kantvoĉo K 1·20, por virĥoro (part.) 50 h., aparta kantvoĉo 25 hel. Eld. Karl Rothe, Leipzig, Koenigstr. 6. — ***Saluto al Belgujo.*** De H. Menalda. Muziko de F. de Ménil. Prezo 1 K. Eld. „Espero" Haag, Prinsestraat 48, Holland. — Ĉe la sama: ***Nederlanda kantaro esperantista***; 10 belaj kantoj kun bone konataj holandaj melodioj, verkitaj kaj tradukitaj de F-ino N. Boon. Prezo 50 h. — ***Al Montmartro,*** himno. Poezio de J. Cam. Chaigneau, muziko de F. de Ménil. Prezo K 0·25. Eld. Esp. Sekcio de Montmartre, Paris, 51 rue de Clichy. — ***Trovita,*** romano. El. Goethe trad. A. Grabowski. Muziko de Fr. Braga. Prezo 75 h. — ***Kanto de l' ekzilo.*** Poezio de C. Dias trad. Fr. V. Lorenz; muziko de Q. de Oliveira. Prezo 75 h. Eld. Brazila Ligo Esp. (Ĉe P. E. S.). — ***Esperanta kantaro*** (13 kantoj). Prezo 1 K. ***Esperantista kantaro*** (17 liedoj originalaj aŭ esperantigitaj) U. E. A. Genève. — ***Elekto el germana kantitresoro de Erk*** — Auswahl aus Erk: Deutscher Liederschatz. (37 pecoj, 48 pĝ.). Eld. C. F. Peters en Leipzig. Ĉe Esp. Propaganda Instituto en Leipzig, Kaiser Wilhelmstr. 15. — ***Ordo de Diservo*** en la preĝejo de s. Kruco en Kraków. — ***Al la fratoj.*** Vortoj de Dr. L. L. Zamenhof, muziko de St. Suda. Prezo 60 hel. Eld. Esperantista Klubo en Plzeň. — ***The „Huddersfield".*** Collection of Favourite Songs. 15 pecoj, 23 pĝ.). Prezo 40 hel. Ĉe J. H. Fitton, Huddersfield 2, Stanley Str. Lindley. — ***Kristana Esperanta Kantareto*** (11 kantoj). Prezo 60 h. Eld. P. Hübner, Mühlheim a. Rh.

KORESPONDANTOJ: *117. S-o Adr. Meys, ***Tilburg,*** Hasseltzt. 287. N e d e r l a n d o (kor. pri diversaj timoj). — *118. F-ino K. de Maesschalk, studentino, ***Antwerpen,*** Lange Looibroekstraat 204. B e l g u j o (kor. kun Bohemoj por perfektiĝi en E.). — *119. S-o John F. K. Kendrick, Box 182., ***South Whitley,*** Indiana U. S. A. (interŝanĝas fot. portretojn de samideanoj; sur poŝtk.). — *120. S-o Antono Vila, ***Santa Colona de Farnès,*** Pl. de la Constitucion, Gerona, H i s p a n u j o (kor. kun gejunuloj). — *121. S-o Boris Andrejeviĉ Popov, ***Orel,*** Ĉerkeskaja 27. R u s u j o. — *122. S-o D. J. Broekhuizen, ***Haag,*** 57. Steynlaan, N e d e r l a n d o (dez. ricevi informojn pri oficialaj subtenoj donitaj al E. kaj pri la sukcesoj de instruado pri E. en publikaj aŭ privataj institutoj; li redaktas esp. rubrikon en organo de nederl. instr.). — *123. Membroj de la Esp. Grupo en ***Buenos Aires*** Tacuari 1402., Argentina, S u d a A m e r i k o, dez. korespondadi. — *124. S-o A. Prager, ***Moskva,*** poŝtkesto, R u s u j o (il. k. kun marko bildflanke). — *125. S-o Nikola Vasiliev, ***Bosilegrad,*** Kustendilsko, B u l g a r u j o (ĉiam rasp.).

K o r e k t o j: En la lasta (8.) aldono restis kelke da korektotaj preseraroj: pĝ. 150, anst. ***fieree*** legu: ***fiere***; pĝ. 151. anst. ***fastajn kantojn*** legu: ***fastokantojn***; pĝ. 152. anst: ***kurto*** legu: ***korto.***

Seznam časopisů esperantských přineseme v příštím ročníku.

POZVÁNÍ KU PŘEDPLACENÍ NOVÉHO ROČNÍKU.

Tímto dvojčíslem jest dokončen VI. ročník naší revue. První číslo ročníku VII. vyjde 1. ledna a bude zasláno všem letošním předplatitelům. Žádáme své přátele, aby laskavě zaslali předplatné na nový ročník nejpozději během ledna; tím umožní nám stanoviti náklad čísla druhého, které pak může vyjíti opět prvního v měsíci. **Předplatné 3 K.**

Členové spolků sdružených v B. U. E. dostávají časopis prostřednictvím svých pp. jednatelů za cenu sníženou **K 2·50.**

V příštím ročníku budeme uveřejňovati v jazykovém rádci vedle dvojjazyčných cvičebných textů také překlady českých frází; kromě obvyklých statí budeme přinášeti též úryvky z jiných esperantských časopisů. V příloze vycházející překlad „Babičky" bude na dále psán panem K. Procházkou, neboť nedostatek času nedovoluje p. Tobkovi, aby v této práci pokračoval.

Doporučujeme všem přátelům dobré esperantské četby, aby obohatili svou knihovnu dosud vyšlými šesti ročníky „Časopisu Českých Esperantistů", které lze dostati za cenu sníženou: Roč. I., II., III., IV., V., po K 2·20 (pro členy B. U. E. po K 1·70), roč. VI. za K 2·50 (K 2·20).

Vhodný vánoční dar. — Příloh bez časopisu nelze obdržeti.

Eldonanto: Ed. Kühnl. — Presejo de Národní tiskárna a nakladatelství, společnost s r. o. v Praze.

ODZNAK

Esperant. (**pěticípá zelená hvězda v bílém kruhovém poli**) 70 haléřů, menší 50 hal. :: vyplacené. ::

Jediný svého druhu český odborný a umělecký list, ═══ ústřední orgán sběratelů všech oborů ═══

ČESKÝ SBĚRATEL.

(Umělecké zvláštnosti, starožitnosti, národopis, numismatika, heraldika, praehistorie, obrazy, rytiny, umělecké plakáty, moderní tisky a knihy, staré tisky, Ex libris, porcelán, sklo, uměl. dopisnice, pošt. známky atd.)

Redaktor spis. **ANT. MACEK.** Bibliofil. úprava ak. mal. **O. ŠTÁFLA.**

Vychází 1. dne každého měsíce mimo srpen a září. Předplatné na celý rok 6 K i s pošt. Neobyčejný zájem o list, jakož i velké rozšíření jeho mezi sběrateli, bibliofily, filatelisty atd., zvláště pak v kruzích uměleckých, zaručuje úspěšnou inserci. — 1 str. 50 K, 1/2 str. 25 K, 1/4 str. K 12·50, 1/8 str. K 6·25, při častější inserci sleva. Malý Oznamovatel (Prodej, Koupě, Výměna, Dražby, Všeobecný oznamovatel) 1 ř. 25 h. **Redakce i administrace v Žižkově, Palackého tř. 679.** Účet pošt. spoř. č. 127.480.

LA ONDO DE ESPERANTO

- MONATA - ILUSTRATA - REVUO -

(fondita en la jaro 1909). La abonantoj de la j. 1912 jam ricevis **senpage** romanon de A. Tolstoj „Princo Serebrjanij", kies prezo por ne-abonintoj estas **Sm. 1·60 afr.** Nun ĉiu abonanto de la j. 1913 — krom 12 n-roj de l' gazeto — **senpage** ricevos **donace** belan esper. libron: **„ORIENTA ALMANAKO"** el la lingvoj japana, ĥina, araba, hinda, sanskrita, persa, amena, kartvela k. t. p., k. t. p. „La Ondo" aperas akurate la 1-an daton, novstile. Ĉiu n-ro havas **16—24** paĝ. Formato 17×26. Bela kovrilo. Literaturaj konkursoj kun premioj. Portretoj de konataj Esperantistoj. Diversaj ilustraĵoj. Beletristiko originala kaj tradukita. Plena kroniko. Bibliografio. Amuza fako (kun premioj). Anekdotaro. Korespondo tutmonda. (Poŝtk. ilustr.). **Anonco en „Koresp. Fako" — 3 respondkuponoj.** La abonpagon (**2 rubl. = Kor. 5·10**), oni sendu al librejo „Esperanto" (**Moskvo, Tverskaja, 26, Ruslando**) aŭ al aliaj Esper. librejoj (poŝtmandate, respondkupone, papermone, per bankĉekoj aŭ per transpagilo de Esp. Ĉekbanko (Mendu pere de la red. de Ĉ. Ĉ. E.).



VIA HORLOĜO IROS PRECIZE

se vi donos ĝin ripari kaj rebonigi al

FR. NOVÁK,

horloĝisto.

Praha I., Malé nám. 10.

Magazeno de horloĝoj kaj juveloj.

Prezoj mirinde moderaj!!!